

Sendependa revuo en Esperanto

Tra la mondo

Esperanto-Muzeo

Esperantistoj

Komerco per Esperanto

kunvenoj kaj kursoj

Forumo

Esperanto-urbo

Vojaĝoj

Fakaj asocioj

Impreso pri Ĉinio

Sciencoj

Literaturo

N-ro 2 (2) Aprilo 2017

Tra la mondo



Sendependa trimonata revuo
fondita la 1-an de januaro 2017
en reta kaj papera formato A4(202×268)

Kotizo

La reta versio estas senpage elŝutebla
ĉe: <http://esperanto-urb.de/tra-la-mondo>
La paperan version ricevas financaj subtenantoj
Mondonaco al ICH

Direktoro de la eldonejo

Peter Zilvar

Eldonejo de Tra la mondo

Interkultura Centro Herzberg
DE-37412 Herzberg/Harz,
Grubenhagenstr. 6. Germanio
Tel/Fakso: 0049/(0)5521-5983,
Poŝtelefono: 0049/(0)160-98754-190
esperanto-zentrum@web.de
<http://esperanto-urbo.de>

Honora Ĉefredaktoro

Zsófia Kóródy

Ĉefredaktoro

Trezoro Huang Yinbao

Redakcio

Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian Shijieyu Zhongxin,
744300, Pingliang Gansu, Ĉinio,
Tel: +86 (0) 933 3329289, +86 (0) 18893316800
trezoro@qq.com, agrikulturo@126.com

Kunlaborantoj de la aktuala numero

Ardo Hu Guopeng

Liu Minghui

Meng Yuli

Robert Moerbeek

Gajo Li Chuanhua

Trigo Peng Zhengming, Wei Shan

Kunlabora organizo

Esperanto-Muzeo Zaozhuang Ĉinio

ENHAVO

La plej granda E-muzeo en la mondo	31
Wei Yubin estis premie listigita en la panteono de <i>Edukado.net</i>	32
Festo por la 60-jara jubileo de la esperantistigo de Hu Guozhu	33
Mentoro kies favoro utiligas min dum mia tuta vivo	34
Komerco per Esperanto en Ĉinio	35
La unua Esperanto-kurso por infanoj en hejmloko de s-ro Hu Juczi	36
Lee Young-Koo varbis partoprenantojn en Pekino	36
Festo al la Zamenhofa Tago	37
Filmetaj Kursoj de EPĈ	37
Pekina Esperanto-Asocio okazigis printempfestan tekunvenon	38
Shandong-a Esperanto-Klubo estis fondita	39
Jarkunveno de Tianjin-a Esperanto-Asocio	39
Jarkunsido de Anhui-a Esperanto-Asocio	40
30-jariĝo de Zhejiang-a Esperanto-Asocio	40
Vizito al veteranaj Esperantistoj antaŭ la Printempa Festo	41
La Komuna Staĝo de Koreaj Kaj Tajvanaj Esperantistoj	42
Esperanto-atingaĵoj en Herzberg am Harz en 2016	44
Somera Esperanto-Perfektigo.....	45
Tra la mondo fariĝas senpaga	45
Internacia Kolegio de Nova Silka Vojo serĉas instruistojn el Esperantujo.....	46
Esperanto-Centro Ora Ponto serĉas volontulojn	46
Videblas konkursaĵoj por "Teo kaj Amo"	47
Ĉina Radio Internacia invitas vin al la rubriko "Kampo de Literaturo"	47
Lando de Fajroludo - Impreso pri Ĉinio en la okulo de Korea esperantisto	48
Konsilia kunveno de Xinxiang-a Esperanto-Asocio	48
Esperanto-Numismatika Asocio	49
Mia vojaĝo al Usono (1)	50
Ekskurso al kamparo en aŭtuno	51
"Estas nur teorio, ĉu ne?"	52
La minacoj de fumado	52
Poemoj	53
Anekdoto pri Lusin	53
Ĝuu la vivon	53
La ĝardeno de persikaj floroj	54
La sekreto	55
Bildo en la antaŭa kovrila paĝo: Bela vilaĝo en Tajvano, foto de Li Yanfu	
Bildoj en la posta kovrila paĝo: Plantado en la Esperanto-urbo	

La senatentajn simplajn foliumantojn de la revuo *Tra la mondo*, profunde impresos, ne nur Esperanto-movado en Ĉinio pri la plej granda kaj luksa E-muzeo en la mondo, esperantistoj, sukcesa per-Esperanta komerco, diversaj kunvenoj, kursoj, festoj, renkontiĝoj, amuzaj vojaĝoj, varbado por 102-a UK, filmeta konkurso, ankaŭ rubriko pri Esperanto-urbo, fakaj asocioj, sciencoj, literaturo ktp. Oni legos ankaŭ temojn pri informoj el ICH, kaj pri la mesaĝa inundo al Unesko de niaj samideanoj.

La ĝojinda afero estas tio ke ekde nun, Interkultura Centro Herzberg (ICH) kaj Esperanto-Centro Ora Ponto decidis kunlabore eldoni la revuon. Kaj ni decidis ke la reta versio estos senpaga al ĉiuj. Bonan legadon!

Peter Zilvar

Direktoro de Interkultura Centro Herzberg, Germanio

Trezoro Huang Yinbao

Direktoro de Esperanto-centro Ora Ponto, Ĉinio

La plej granda E-muzeo en la mondo

■ **Mirejo Grosjean**

La 8-an de novembro 2016, post la 8-a Azia Kongreso, Mirejo Grosjean, Prezidanto de ILEI faris esploran viziton al E-Muzeo de Zaozhuang Universitato Ĉinio. Jen la koncizigita raporto.

La urbo Zaozhuang en la provinco Shandong situas 640 km sude de Pekino. Per rapida trajno oni atingas ĝin de tie ene de du horoj kaj duono. La urbo situas en la plej loĝata parto de la lando, en egala distanco al Sanhajo, do la centro estas facile atingebla por ĉinoj kaj eksterlandanoj. La urbo havas proks. 4 milionojn da loĝantoj kaj ĝia sola universitato havas proks. 18 mil gestudentojn. Esperanto ennestiĝis en tiu universitato, unuavice en la formo de Esperanta muzeo.

Oni diris al mi, ke la universitato estas sufiĉe nova, sen granda prestiĝo. Pro tio la gvidantoj de la universitato vidas la eblon akiri prestiĝon tra Esperanto. Iom post iom la universitato eniras en nian movadon; de 2011 okazas ĉiujare nedeviga kurso de Esperanto, kiu okazas ĉiusemestre kaj la gestudentoj povas gajni du poentojn per 32 studo-horoj. Esperanto-Asocio aktivas. Pro la nova linio de rapida trajno oni konstruis novan stacidomon en la urbo en loko, kiu nun estas iom fora de la malnova urbocentro. Pro tio naskiĝas nova urbocentro moderna ĉe la nova stacidomo. En tiu nova centro la universitato ricevis terenon duoble pli grandan ol la nuna surfaco.

La muzeo translokiĝos en 2018 al tiu nova loko kaj ankaŭ akiros pli da surfaco. La muzeo, fondita en 2013, estas fako de la universitato. La ŝtato disdonas monon por

muzeoj, la universitato ricevas subvenciojn por la E-muzeo. La gvidantoj tre favoras kaj subtenas la muzeon.

Mi renkontis la gvidantojn jam en Buenos Aires en 2014. Inter ili estis sinjoro Sun "Semio", la motoro de la muzeo. Li diris tiam jam, ke ni antaŭvidu paŝon por firmigi la ekziston de la muzeo per kontrakto kun la universitato, urbo, provinco kaj ŝtato.

La muzeo okupas 680 kvadratajn metrojn; tio signifas, ke tiu E-muzeo estas preskaŭ certe la plej granda en la mondo. La planata muzeo okupos pli ol du mil kvadratajn metrojn. La muzeo havas diversajn salonojn, ĉiu pri preciza temo. Plie la muzeo havas kunvenĉambron kun proks 30 sidlokoj en vicoj kiel en kinejo. Apude estas konservejo kun 10 movŝrankoj. La muroj estas blankaj kaj verdaj; la prezento estas rezulto de la laboro de la gestudentoj en la arta fakultato de la universitato. La decidoj, kion prezenti, kaj la kolektado de la materialo estas rezulto de la laboro de sinjoro Sun, kiu havas laborĉambron apud la muzeo kaj duan en la universitato.

La taskoj de la institucio estas informi, lertigi kaj konservi. La lertigado okazas per surlokaj kursoj kaj seminarioj. Ĝi kolektas librojn novajn, antikvajn aŭ brokantajn, revuojn (centon da titoloj), dokumentojn, artaĵojn, sonbendojn, diskojn, insignojn. Ne estas libroservo. Oni abunde skanas fotojn – la enretigo de la havaĵo estas survoje.

La personaro el tri landoj konsistas el ok plen- aŭ portempaj postenoj. En la nova muzeo la malfermaj horoj estos tra ĉiuj tagoj de la semajno kaj en la pli granda spaco povos esti ĉambro por ILEI kaj UEA.

Fine de la vizito okazis solena konkludo kun sinjoro Cao Shengqiang, la rektoro de la universitato, en unu flanko de la tablo kaj Mirejo kaj sinjoro Bak je la alia flanko. Sinjoro Bak estas el Koreio, profesoro en tiu universitato kaj altnivela esperantisto. La direktoro dankis pro la esplorvizito. Mi skizis la strategion de la kontrakto substrekante

klare, ke mi portos tiun projekton al la du estraroj (ILEI kaj UEA), kiuj diskutos kaj decidus. La etoso estis tre pozitiva kaj respekto plena.

Post la vizito de la muzeo Mirejo sugestas al la lokaj prizorgantoj jenajn paŝojn:

1. Aktualigi daŭre la dokumentojn en la ekspozicio.
2. Kreskigi la nombron de movŝrankoj de 10 al 40.
3. Listigi la mankantajn verkojn kaj diskonigi la liston cele al kompletigo de la havaĵo.
4. Zorgeme noti en la ĉina kaj en Eo ĉiujn verkojn, indikojn k.s. (nuntempe en diversaj lokoj aperas nur la ĉina lingvo)
5. Uzi Esperanton inter la kunlaborantoj dum la laborhoroj por ebligi pli altan lingvan parolkapablon.

Se ni pripensas pri kontrakto por firmigi la ekziston de la muzeo, tia dokumento povus esti modelo por aliaj tiaj institucioj, ekz. CDELI en La Chaux-de-Fonds. La subskribontoj devus esti internaciaj (ILEI kaj UEA), ĉinaj (urba klubo, provinca asocio, Landa Asocio), universitataj (direktoro, prezidanto...), la urbo (espereble la urbestro), la provinco (oficisto de la provinca registaro) kaj eble la ŝtato." La plena raporto pri la vizito listigas eblajn rolojn por UEA, ILEI, ĉinaj instancoj, la universitato kaj la muzeo mem.

Nun komenciĝas diskuto pri la taŭgeco de tia kontrakto kaj pri ĝia enhavo. Se ni iras tiun vojon, la subskribado devus okazi en la muzeo mem, eventuale lige kun la UK en Seulo. Se ni iros tiun vojon al firmigo per kontrakto, tio bone trovus lokon en la ILEI-programo 'Ni Savu Niajn Semojn', en la Jaro de la Lernanto kaj en la Zamenhof-Jaro.

La plena teksto de la raporto legeblas ĉe www.ilei.info, aŭ ĉe: <http://mirejo3.blogspot.ch/2016/12/eomuzeo-en-zaozhuang-cinio.html>.

La retejo de la Muzeo estas ĉe <http://www.e-muzeo.com>.

La teksto koncizigite redaktita de Stefan MacGill, aperis en januara numero de Esperanto.



Mirejo Grosjean

Wei Yubin estis premie listigita en la panteono de Edukado.net

■ *D-ino Katalin Kováts*

Edukado.net premie publikigas 10-15 novajn prezentojn de vivantaj instruistoj ĉiujare la 15-an de decembro. La 15-an de decembro 2016, s-ro Wei Yubin, esperante Jado, estis premie listigita en la panteono de *Edukado.net*.

S-ro Wei Yubin estas direktoro de elementa lernejo, vic-sekretario de Ĉina Ligo de Esperantaj Instruistoj kaj estrarano de Ĉina Esperanto-Ligo. Li naskiĝis en gubernio Lucheng de provinco Shanxi, Ĉinio, en la 14-a de februaro 1965. En 1984, kiel studento de la Sporta Kolegio de Shanxi li okaze ekkonis Esperanton, kaj tuj interesiĝis pri ĝia interna ideo. Post unujara memlernado, li partoprenis la 1-an Esperanto-Kongreson de Ĉinio, okazigitan en urbo Kunming, provinco Yunnan.

En 1985, li iĝis instruisto en la 2-a Elementa Lernejo de Taiyuan-a Ŝtala Kompanio. Pro aktiva agado li estis elektita kiel membro de la konsilantaro de Esperanto-asocio de Shanxi. En 1986, li partoprenis tradukajn konkursojn de *La Mondo*, organo de ĈEL, kaj multfoje akiris bonajn premiojn. Post du jaroj, li kontribue publikigis sian unuan Esperanto-verkaĵon *Aĉeti Legomojn* en *La Mondo*.

En 1990 li unuafoje akceptis fremdlandan esperantiston, nome, japanon Hideki Nakao, studenton pri la ĉina literaturo en Universitato Shanxi. Post tio Wei Yubin daŭre aktivis en Esperanto-movado. Li gvidis E-kursojn, partoprenis diversajn aktivadojn de la loka Esperanto-asocio, korespondis kun alilandaj esperantistoj, kontribuis al *La Mondo* originalajn



La aŭtoro D-ino Katalin Kováts

verkaĵojn, ekzemple *Rata Veneno*, *Saĝa fiŝkaptisto*, *Novjara bondeziro* ktp.

En 1991 lia unusola filo naskiĝis. Li provis klerigi lin kiel denaskan esperantiston, klopodinte pli ol kvin jarojn, kaj ricevis ĝojigan rezulton. Sed en la jaro kiam lia infano ekvizitis lernejon, li transposteniĝis al pli altnivela instanco, respondecante pri instruaj kaj esploraj aferoj. De tiam li eksilentis en Esperantujo preskaŭ dek jarojn.

En 2000 li fariĝis direktoro de La 6-a Elementa Lernejo de Taiyuan-a Ŝtala Kompanio (lernejo kun pli ol 1400 infanoj, en 2006 alinomiĝis kiel la Elementa Lernejo Baiyangshu-strato, kaj ekestis administrata de la registaro de la urbo kaj ne plu de la kompanio). En junio de 2006 li speciale vojaĝis al la Templo Duobao en provinco Zhejiang, suda Ĉinio, por observi la esperantan kurson, gvidatan de sinjoro Dannis Keefe. Reveninte li okazigis Esperanto-kurson por instruistoj de sia lernejo. Post du jaroj ses junaj instruistinoj estis sukcese bakitaj kiel instruistoj de Esperanto. En printempo 2008, Esperanto kiel deviga programo oficiale enkondukiĝis en la lernejan horaron. Ĝis nun pli ol kvincent infanoj lernis kaj lernas Esperanton. Post unu jaro, instruado de Esperanto listiĝis kiel eksperimenta projekto de eduka scienco de la Eduka Akademio de Shanxi-provinco. En 2009 li akceptis la usonan profesoron Ronald Glossop (kiu dufoje vizitis la lernejon), kiu faris instruadon en la lernejo. Multaj infanoj kaj iliaj gepatroj ĝuis lecionojn gvidatajn de Ronald Glossop.

En 2010, la 2-a seminario de ĉina sekcio de ILEI okazis en lia lernejo. Li prenis sur sin aranĝon de la tagordo, kaj sukcese akceptis esperantistojn el diversaj landoj. La lernejan unuafoje vidis tiel multe da fremdlandaj esperantistoj, kaj ĝuis iliajn instruojn en malsamaj manieroj.

En decembro de 2013, li okazigis la 1-an Esperanto-semajnon en sia lernejo, pli ol 1400 lernejanoj kun siaj gepatroj ĝin partoprenis. En la ferma ceremonio li parolis ĉine kaj esperante: “Kvankam la vetero estas frosta, tamen niaj lernejanoj havas grandan entuziasmon, kion ni povus vidi de iliaj scivolemaj kaj amindaj vizaĝoj. Mi ekmemoras la romanon verkitan de la hungara esperanta verkisto Julio Baghy, Printempo en Aŭtuno. Ni povus diri ke la Esperanto-semajno ja donas al ili printempan



Wei Yubin

varmon, tio estas Printempo en Vintro. En tiu ĉi speciala printempo ni semis verdajn semojn en ĉiujn korjojn.” De post tiam ĉiujare ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago, la lernejo okazigas Esperanto-semajnon. En la semajno, la nacia kaj esperanta flagoj alte flirtas super la lerneja sportejo. La infanoj prezentas esperantajn programerojn. La instruisto preparas diversajn lecionojn pri Esperanto. La infanoj kantas, dancas, pentras, verkas, legas, festas. La semajno fariĝis tre ŝatata festivalo por la infanoj.

En 2014 li partoprenis la 4-an seminarion de ISOA, okazigitan en Kioto, Japanio, kaj faris prelegon *Esperanto en nia lernejo*. En 2015, li akceptis la francan instruistino Annie Grente, kiu instruis en la lernejo du monatojn. Printempo 2016, la korea esperantistino Songanta vizitis la lernejon kun la misio propagandi la infanan kongreson okazigitan en la 102-a universala kongreso en Seulo. Dank’ al lia subteno kaj pena laboro en la lernejo pli ol dek infanoj jam esprimis sian volon ĉeesti la kongreseton. Ili estas trejnataj por renkontiĝi kun alilandaj amiketoj en Seulo, Koreio.

Mi kore gratulas lin okaze de lia jubilea enpanteoniĝo. Estas honoro havi lin inter la meritplenaj misiistoj de nia kara lingvo. Mi admiras lian persistan laboron por nia lingvo. Li faris miraklojn en lia lernejo. Speciale min ĝojigas ke mi povis instrui kaj ekzameni kelkajn el liaj instruistinoj en Hajnandao, kiuj nun modele agadas en la lernejo. Mi kore salutas ankaŭ ilin. Pluan energion, bonan sanon kaj multe da feliĉo deziras al li.

D-ino Katalin Kováts estas direktoro de Edukado.net. Ŝi kune kun aliaj konataj fakuloj gvidis kursojn kun 131 partoprenantoj el 23 landoj en Esperanto-Insulo 2012 en Hainandao, Ĉinio. S-ro Wei Yubin kaj liaj kelkaj kolegoj el lia lernejo estis lernantoj de la kursoj. (-red.)

Festo por la 60-jara jubileo de la esperantistiĝo de Hu Guozhu



La 24-an de Decembro 2016 por festi la 60-jaran jubileon de la esperantistiĝo de s-ro Hu Guozhu, la Huangshi-a Esperanto-Asocio okazigis kunsidon en la hotelo Changhang en la urbo Wuhan, Hubei-provinco, Ĉinio. Ĉirkaŭ 60 geamikoj, Esperanto-lernantoj kaj adorantoj de s-ro Hu Guozhu, el Beijing, Heilongjiang, Shandong, Anhui, Guangdong, Jiangxi,

Guangxi, Hubei provincoj en Ĉinio ĉeestis la festan kunsidon, kun speciala temo "Ne forgesu la historion por disvolvi la spiriton de Longa Marŝado de Esperanto kaj kuraĝigu la posteulojn por disvastigi Esperanton en diversaj flankoj". Franca veterana esperantisto Henry Bruno ĉeestante la kunsidon voĉlegis la gratulajn leterojn de la eksprezidanto de UEA

Renato Cosertti (Italio), eksprezidanto de verkista asocio Berveling (Nederlando), ĉefredaktoro de *La Gazeto Eugène de Zilah* (Francio), Redaktoro de *Fonto Bays* (Brazilo). Ĉina Esperanto-Ligo sendis gratulan leteron al la kunsido. *Tekstoj kaj fotoj de Hu Fengsheng kaj Qi Jian.*

Redaktoro de la rubriko: Trigo Peng Zhengming, Hu Fengsheng

Pri Guozhu

Hu Guozhu (Esperanta nomo: Miĉino, Eĉino) 1938-02-03 naskiĝis en Wuhan. Jarfine de 1954 diplomigis el la Teksila Politekniko de Wuhan. Dum 1955 - 1966 laboris en la 1-a kaj 6-a Ŝtata Teksila Fabriko de Zhengzhou, Henan-provinco. Ekde la majo de 1966 laboris en Huangshi. En 1981 fariĝis inĝeniero. En 1989 fariĝis supera inĝeniero. En 1994 emeritiĝis.

1956: komencis memlernis Esperanton, la lernado daŭras dumvive. Dum 1959 - 1966 kontribuis tradukojn al la revuo *El Popola Ĉinio*.

1979: aliĝis al Hubei-a Esperanto-Asocio, funkciis kiel komitatano (1979-1986), vic-prezidanto (1986-2000), kaj prezidanto (2001-2010).

1981: funkciis kiel prezidanto de Huangshi-a Esperanto-Asocio.

1990: aliĝis al ĈEL. Poste fariĝis konsilano kaj honora konsilano.

1983: membriĝis al UEA. 1989: al ILEI kaj fariĝis rajtigita ekzamenanto.

2004: membriĝis al Esperantlingva Verkista Asocio (EVA).

Li verkis la libron *Esperanta Metriko* (eldonita de Huangshi-a Esperanto-Asocio 1983), aliajn verkojn *Hu Parolas Maldelire* (2000), *Guozhu kaj Ni* (2006), *Hu Laŭdas Verdakore* (2004), *Nefinlegebla Dante* (2006), *Ĉineska Gvidlibro* (2007), *Dek Mesaĝoj pri Esperanta Metriko* (2008), *Dek Mesaĝoj pri Rondelo* (2008), *Ĉina Galerio•108 Rondeloj de Guozhu* (2008), *Kantoj dum Vojaĝo de Homa Vivo* (poemoj en la ĉina), *eseon Nova Floro kun Ĉina Odoro* (2007), *librotion El Verda Klaravo* (2011 en tri volumoj), *Babiloj Sur Verda Monto* en du kolektoj po cent pecoj. La papera versio de la unua kolekto (n-ro 001-100) aperis en 2015 kaj tiu de la dua kolekto (n-ro 101-200) aperis en 2016.

En 1972 prove versis ĉineske, fariĝis iniciatinto de ĉinesko.

Kompilis lernolibron *Elementa Kurso de Esperanto*, eldonita de ĈEE 1992.

Esperantigis la libron *Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero* de Lusin (1981, EPC). *Triptiko de Amrakontoj de Tang-dinastio* (1998, *Penseo*), *Senfina Bedaŭro kaj la Bivistino* (2000 HEA).

Ĉinigis la eseon de D-ro Zamenhof *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia* (1980, Xinhua KEL), *Kroata fabelo Wakajtaju* (2006, HEA)

Kunredaktis *Poemoj de Armand Su* (1992,

ĈEE). Kuntradukis *Poemoj de Li Bai* (1997, Japanio), *Poemoj de Tang-dinastio* (2007 Ĉinio).

Li fariĝis redaktoro de *Nova Floro* (1980-1989), *Penseo* (1997-1999).

1987-3-29/30, ĈRI raportis pri *La Vojo de ĉina esperantisto Hu Guozhu*. EPĈ (1996-10) raportis pri *Hu Guozhu en Esperantujo*.

2007-12-09, en la 7-a Ĉina Kongreso de Esperanto estis honorita per la Premio de Speciala Kontribuo por Ĉina EM.

2009 majo ĈRI disaŭdigis la intervjuon al Guozhu.

Inspirite de la fakto ke la Esp-igo de la plena teksto de *Strangaĵoj de Liaozhai* tradukita dum 30 jaroj neniam havas la ŝancon eldoniĝi, ekde 2003 memlernis fari eLibrojn kaj ĝis nun pli ol 30 eLibroj de Guozhu jam aperis interrete ĉe <http://www.elperno.cn/elibro/elibro.htm>.

Ekde 2012 li redaktis la rubrikon *Aprizo pri Ĉinaj Antikvaj Poemoj* por la retpaĝo *El Popola Ĉinio*. Papera kolekto *Babiloj Sur Verda Monto* aperis en 2015 (la unua kajero kun cent pecoj) kaj en 2016 (la dua kajero).

Li estas kunlaboranto de *La Gazeto kaj La Kancerkliniko*.

En 2016 akiris la titolon Honora Profesoro de Zaozhuang-a Universitato.

Mentoro kies favoro utiligas min dum mia tuta vivo

■ **Gemo Wang Hao**

Mi ekkonis s-ron Hu Guozhu en septembro de 1982. Tiam iras arde la varbado de novaj lernantoj por la 6-a kurso de Huangshi-a Esperanto-Asocio (HEA). La elementa kurso jam sukcese varbis pli ol 300 novicojn. Oni dividis ilin en pli ol dek klasojn. Inaŭgura ceremonio por la nova kurso okazis solene en la Hotelo Haiguanshan. S-ro Guozhu donis parolon en Esperanto kiel Prezidanto de HEA. Laŭ mia memoro verŝajne iu alia interpretis ĉinige por li.

Tiam mi estis studento de fakultato pri la ĉina lingvo en la Pedagogia Kolegio de Huangshi. En plena entuziasmo mi anoncis min por lerni Esperanton. Nia klaso havis lecionojn en la nomita kolegio. Nian kurson gvidis instruisto Persikfloro. Lernolibroj estis *Aboco de Esperanto en Dek Lecionoj* kaj *Elementa Kurso de Esperanto*. La lerniloj ambaŭ estas kompilitaj de s-ro Guozhu. Poste mi daŭrigis mian lernadon de Esperanto en la sidejo de Libro-servo de HEA. Nian kurson gvidis s-ro Lin Liyuan. En 1984, HEA funkciigis Paroligan Kurson sub gvido de s-ro Guozhu. Mi havis la bonŝancon partopreni en la lernado. Inter la kunlernantoj troviĝas ankaŭ s-ro Dai Liming el urbo Changchun kaj aliaj.

I. Solida fundamento de lingva aplikado je virtuozecon

S-ro Guozhu persistis en studado kaj aplikado de Esperanto dum sesdek jaroj kun fekundaj atingoj. Tio estas evidenta kaj admirata de ĉiuj. Ekde la 80-aj jaroj de lasta ĵo ĝis nun, dum pli ol 40 jaroj li ĉiam luktas



Wang Hao, aŭtoro de la artikolo

por la granda idealo de Esperanto, senriproze eĉ por unu tago. Por li ekzistas neniam feria tago. Li plenumis verkadon kaj versadon de ĉ. 15 milionoj da vortoj. El lia plumo estis poemoj, prozoj kaj pli multe estas tradukoj, esperantigaj kaj ĉinigitaj. Multego da liaj verkaĵoj aperis en Esp-gazetoj en Ĉinio. Ankaŭ pli ol dek revuoj ekster Ĉinio publikigis verkaĵojn de Guozhu. Nature, pli multaj verkaĵoj kaj tradukoj ankoraŭ kuŝas en lia komputilo, atendante la ŝancon de publikigo.

S-ro Guozhu havas solidan fundamenton pri aplikado de ĉina lingvo. Li estas eksperta precipe pri la poezio de antikva Ĉinio. S-ro Guozhu verkis fakan libron *Esperanta Metriko*. Tio vekis admiron de mi kiel studento en fakultato de ĉina lingvo. Li esperantigis la majstrajn verkojn kiel *Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero* de Lusin kaj *Strangaĵoj de Liaozhai* de Pu Songling. De tio ni povas vidi kiel grandan virtuozecon li havas.

II. La Serioza Stilo de Sintenado al Vivo

En tiuj jaroj s-ro Guozhu donis lecionojn al ni ĉiam post sufiĉa preparo kun granda zorgemo. En klasĉambro li parolas kiel eble pli ofte en Esperanto. Li lerte klarigas malfacilajn lerno-objektojn per simplaj vortoj, tial en nia klasĉambro ĉiam estas plena de vigla etoso. Li tre atentas pri tempo-limo. S-ro Guozhu venas al nia klasĉambro ĉiam frue. Li komencas doni lecionon ekzakte je la difinita horo (eĉ je minuto), sen atendo al tiuj malfruigantoj. Lia konduto forte influis min, tiel ke mi ankaŭ havas fortan koncepton pri tempo kaj tiu kutimo utiligas min dum mia tuta vivo.

S-ro Guozhu faras ĉion tre zorgeme. Iufoje li petis min transdoni ion al lia patro, kiu loĝas kontraŭ la fervoja stacidomo de Wuchang. Li donis al mi memfaritan maposkizon kun detalaj indikoj. Post kiam mi elvagoniĝis, mi facile trovis la cellokon sen nenies helpo.

III. Speciala Amo Inter Ni Instruisto kaj Lernanto

Dum la tempo kiam mi lernis en universitato, mi ĉiam estis aktiva membro de Huangshi-a Esperanto-Asocio.

En 1984 mi partoprenis en la Tutlanda Scienco-Teknika Simpozio kiu okazis en la Meĉinia Politekniko.



Hu Guozhu

En 1985 mi veturis al Kunming kaj ĉeestis en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto.

En 1986 mi vizitis Pekinon por la 71-a UK.

Dum certa tempo mi funkciis kiel redaktoro de *Nova Floro* la organo de HEA.

En junio 1986, mi estis antaŭ la diplomiĝo kaj havos novan laborpostenon en alia urbo Shashi. S-ro Guozhu sentis grandan bedaŭron pro nia disiĝo.

En la 25-a de junio 1986 mi vizitis lian loĝejon en n-ro 24 sur la Parko-strato de Huangshi. S-ro Guozhu elprenis belan libron *Matenaj Floroj Kolektitaj en Vespero* verkitan de Lusin kaj esperantigitan de Guozhu. S-ro Guozhu faris dulingvan surskribon Adiaŭ en la ĉina kaj Esperanto. Tiun libron mi konservas kiel trezoron ĝis hodiaŭ.

Poste, ni havis plurajn revidojn en Shashi, Jingzhou, Wuhan kaj Pekino. Ĉiufoje ni babilis pri Esperanto kaj homa vivo kaj mi akiris multe da utiloj. Dum nia intervidiĝo s-ro Guozhu donacis liajn novajn verkojn, ekz-e *Hu Parolas Maldelire*, *Kanto Dum Vojaĝo tra Homa Vivo*, *Hu Laŭdas Verdakore* kc. Mi rigardis liajn donacojn karaj trezoroj kaj zorgeme legis.

En la 30-a de aprilo 2004, ni kune ĉeestis aktivadon de la Esp-kunvenon de Turo- Flavgruo kaj la 9-a Hubei-a Esp-a Seminario en Wuchang. Mi kaj s-ro Guozhu kune tranoktis en sama ĉambro kaj intime interbabilis. S-ro Guozhu faris surskribon sur lia nova libro *Hu Laŭdas Verdakore* kaj donacis al mi. La daton li skribis "2004-05-01". Mi diris: "Hodiaŭ estas la 30-a de aprilo." S-ro Guozhu rigardis al sia brakhorloĝo. La montrilo jam saltis trans 24-a horo. Li diris: "Alvenas Majtago." Ni ambaŭ ridetis pro la interesa hazardo.

Mi bondeziras al s-ro Guozhu sanon kaj longan vivon!

Mi volas refoje aŭskulti lian instruon!

Komerco per Esperanto en Ĉinio

■ **Aldrin Rodrigues Speck** (Brazilo)

Mi loĝas en Ĉinio ekde 2010, kiam mi alvenis por labori kiel oficisto por Internacia Komerco ĉe la ĉina kompanio Da Vinci, posedata de samideano Wang Tianyi (Ĉielismo), ĉina komercisto kaj gvidanto de la Esperanto-Asocio de Xi'an (Ŝiano). Mi estis invitita de mia amiko Silvio Kniess Mates (ankaŭ eminenta brazila esperantisto) labori kiel tradukisto kaj kvalita inspektisto en la tiam nova ĉina branĉo. La kompanio operacias en eksterlanda komerco, importado kaj eksportado de diversaj produktoj de Ĉinio, Brazilo kaj Angolo (Afriko).

Kiam mi venis al Ĉinio, kaj konis iom pri tiu granda lando, mia scio estis limigita al kelkaj fontoj: malnovaj eldonoj de la revuo *El Popola Ĉinio*, filmoj de Bruce Lee (Li Xiaolong) kaj iu libro verkita de brazila ĵurnalistino Henfil, rezulto de ilia vojaĝo al Ĉinio en la jaro 1977 (tuj post la morto de Mao Zedong), en kiu li priskribas Ĉinion ankoraŭ sub la influo de la Kultura Revolucio, kie ĉiuj havis samajn vestojn kiel militan uniformon, kaj la plej ofta rimedo de transporto estis la ĉiea biciklo.

Tia estis mia opinio pri Ĉinio, granda kaj stranga lando (almenaŭ al miaj fremdaj okuloj de Okcidentano). Sed kiam mi alvenis en 2010, mi trovis tute ŝanĝitan landon kaj longe preter la stereotipoj aldonitaj de ne tiel informitaj personoj.

Mi trovis novan landon, vigan, vekitan el longa dormo, kun granda energio, rigardantan la estontecon kiu alvenas pli rapide, pli ne-atendite.

Ĉiuj diras al mi ke Ĉinio estas kun 5000-jara civilizacio, sed la konstruaĵoj en la urbo estas tute novaj, plejparte sub 50 jaroj da aĝo.

Ĉinio, nova lando kun miljara historio, interesa kombinaĵo!

Ĉio en miaj unuaj monatoj tie ĉi estis malfacilaj, mi devis adapti min al nova vivo, malsamaj manĝaĵoj, malsamaj kutimoj, kaj al la nova laboro kaj ofico en kompanio.

La klimata ŝanĝo estis aparte brutala. Mi naskiĝis kaj kreskis ĉe la suda marbordo de Brazilo, kun mildaj someroj kaj vintroj, humida aero, abunda pluvokvanto dum la tuta jaro, temperaturoj varias de 30 gradoj (en la somero) ĝis 10 gradoj (en la vintro). En Xi'an, la vetero estas tre seka kaj la temperatura varieto estas ĉ. kvardek gradoj (35 en somero, 5 sub nulo vintre!).

Mi bezonis unu jaron por alkitimiĝi al nova cirklo de la naturo, kvankam ĝi havas siajn avantaĝojn, kiel la ĝusta reguleco

kaj antaŭvidebleco de la sezonoj: vintro, printempo, aŭtuno kaj somero tre bone distingitaj kaj stabilaj. En Xi'an, la vetero ne alportas surprizojn, ne kiel mia urbo, Florianopolis, kie foje la 4 sezonoj okazas en la sama semajno (aŭ tago!).


Ankaŭ la manĝaĵo en Xi'an estas sufiĉe malsama de la nutraĵoj en suda Brazilo, multe da pipro kaj fortaj spicoj, kiujn oni ne uzas. En kontrasto, en Xi'an mi manĝis iom el la plej bongustaj nudeloj de mia vivo. Multaj malsamaj specoj de pasto kaj spagetoj, kutime permane faritaj, kiel Lanzhou-nudelo (Lanzhou Lamian), aŭ la aŭtenta ĉina sandviĉo Rujiamuo, Paomuo (supo kun hakitaj pano kaj viando de ŝafo). La manĝaĵo en la urbo vere estas "dikiga", mi gajnis kelkajn "ekstrajn duonkilogramojn" post kelkaj semajnoj.

Por la unuaj du jaroj de mia laboro, mi multe vojaĝis tra Ĉinio, vizitante multajn urbojn, ĉefe en la oriento, en la marbordaj provincoj, kiuj havas la ĉefajn eksportajn industriojn.

Trajnovojaĝoj en Ĉinio estas unika sperto, nova al mi. En Brazilo la fervojoj estas malmultaj kaj ĝenerale uzataj nur por transporti eksportajn varojn kiel fera erco. Pasaĝera transportado ekzistis en la pasinteco, sed malaperis en Brazilo, anstataŭigite per aŭto kaj buso (mallongaj kaj mezaj distancoj) kaj aviadilo (longdistanca).

Foje mi babilis kun brazilano kaj mi diras ke oni multe vojaĝas per trajno en Ĉinio, ŝi faris esprimon de miro kaj diris "Trajno? Jes, mia avino diris, ke kiam ŝi estis juna, ŝi multe vojaĝis per trajno en Brazilo." Por la ordinara brazilano, trajno estas nostalgio de pasinta tempo, multaj konsideras trajnon "malnova", malaktuala teknologio, sed fakte tio estas tute erara. Altrapidaj trajnoj en Eŭropo, Japanio kaj Ĉinio estas la plej altnivelaj kaj efikaj rimedoj de transporto en la mondo, permesante la movadon de grandaj amasoj da pasaĝeroj sekure kaj rapide. La alt-rapida fervojo havas la avantaĝon ke ĝi ne bezonas longtempan kontroladon(ĉeck-in). Krome, trajnaj stacidomoj estas kutime konstruitaj en urbocentroj, dum flughavenoj situas ekster la grandaj urboj, for de la centra areo. La veturado al flughaveno elspezas valoran tempon.

Ankaŭ en la komerca mondo, mi rimarkis grandan kulturalan diferencan. En Brazilo (kaj ĝenerale okcidento) negoco venas unue (la malnova proverbo "Amikoj, amikoj, negoco estas aparta afero"), tio estas, nur post plenumo



Aldrin Rodrigues Speck

de la transakcio (aĉeto, vendo ktp) eblas amikeco inter la komercaj partneroj.

En Ĉinio, ni devas unue establi fidon inter la partneroj antaŭ ol la interkonsento estas farata, kio okazas nur post vespermanĝo kun abunda kvanto da alkoholaĵo (Baijiu), kaj devas respondi al privataj demandoj (Ĉu edziĝinta? Ĉu vi havas infanojn? Kiom da infanoj?). Nur kiam ambaŭ flankoj konas unu la alian pli bone, oni havas bazon por fido kaj subskribi kontrakton. Sen reciproka fideco, oni malfacile povas havi longtempan komercan rilaton, precipe en la kampo de internacia komerco.

Ankaŭ ekzistas diferencoj rilate al la percepto de negocoj. Kiam brazila kaj ĉina komercistoj diskutas pri varoj (eksporto al Brazilo, ekzemple) por havi favoran prezon de la varoj, la brazilano diros "granda aĉeto". Sed por ĉinoj, "granda aĉeto" signifas 100 kontenerojn (25 tunoj da kapacito) dum por la brazila komercisto, limigita de la skalo de sia merkato, multe pli malgranda en populacio, 5 konteneroj jam estas "granda" negoco, kiu kaŭzas miskomprenojn kaj ĉagrenojn por ĉiu flanko. Kiam iu kontraktas en la ĉina merkato oni rekomendas atenti pri la espero de la ĉina partnero en pli realisma nivelo, ĉar en Ĉinio, oni kutimas al granda volumeno da produktado kaj vendoj, tiel evitante problemojn en la negoca rilato.

Tamen, malgraŭ la grandaj diferencoj inter niaj landoj, kaj kulturaj kaj ekonomiaj, Ĉinio kaj Brazilo estas naturaj partneroj kies ekonomioj kompletigas unu la alian, en komuna gajno (win-win), rilato destinita por longdaŭri, tiel mi deziras longe loĝi en Ĉinio, ĉinlingve Lando de la centro, eble dum multaj jaroj.

La unua Esperanto-kurso por infanoj en hejmloko de s-ro Hu Jucz

La 16-a de januaro 2017 estis la 31-a datreveno de la morto de la fama ĉina esperantisto s-ro Hujucz (1896-1986), kiu iam estis lernejo de la centra elementa lernejo en la urbeto Fenghui en urbo Shaoxing de Zhejiang provinco en Ĉinio. Por rememori lian kontribuon al la internacia lingvo kaj disvastigi Esperanton, la 14-an de januaro 2017, la Zhejiang-a Esperanto-Asocio okazigis la Unuan Esperanto-kurson por infanoj de la lernejo en la urbeto. La unuaperioda lernado en la kurso daŭris 5 tagojn kaj finiĝis en la 18-a de januaro. 21 elstaraj lernantoj el la lernejo eklernas Esperanton en la kurso. La gvidantoj el la urbeto registaro, la

lernejo kaj la asocio ĉeestis la malferman ceremonion de la kurso. En la malferma ceremonio, s-ro Zhu En, vicprezidanto de la asocio, prezentis al la ĉeestantoj la planon kaj la organizadon de la kurso, faris prelegon titolitan "Esperanto, la lingvo de espero". En la prelego li prezentis al la lernantoj bazajn sciojn pri Doktoro Zamenhof, Esperanto, interna ideo de la lingvo, E-movado en kaj ekster Ĉinio ktp. S-ro Lin Bao, vicprezidanto de la asocio, donacis al la infanoj Esperantajn albumojn kaj Esperantajn poŝtmarkojn metitajn en kadro mane farita de li. Li ankaŭ donacis al la lernantoj kaj ĉeestantoj memorigajn poŝtmarkojn eldonitajn de Ĉinio en 1987

celebre al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

En la tago de la datreveno la kursanoj gviditaj de s-ro Zhu En vizitis malnovan loĝejon de s-ro Hujucz, kiu eklernis Esperanton en la jaro 1913. S-ro Zhu prezentis al la kursanoj la historion de s-ro Hujucz, kaj lian grandan kontribuon al la Esperanto-Movado en Ĉinio. La kursanoj esprimis pli da intereso por daŭre lerni la lingvon.

En la intervjuo fare de la redaktoro de *Tra la mondo*, s-ro Zhu En diris ke la dua sesio de la kurso okazos en venonta semestro ekde marto.

Laŭ telefona intervjuo al Zhu En

Lee Young-Koo varbis partoprenantojn en Pekino



Wang Ruixiang, vicprezidanto de ĈEL akceptis donacon de Lee Young-Koo (dekstre)



Komuna foto en sidejo de ĈEL. (de maldekstre: Shi Guang, Wang Ruixiang, Nan Youli, Lee Young-Koo, Zhu Mingyi kaj Jiang Liming)

Komence de la nova jaro 2017 Prof. d-ro Lee Young-Koo, la prezidanto de Korea Esperanto-Asocio kaj prezidanto de LKK de ĉi-jara Seula Kongreso flugis al Pekino por partopreni amikan seminarion en Pekina Universitato. Kaptante la ŝancon li vizitis la oficejon de ĈEL, kunsidis kun s-ro Nan Youli, honora prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio kaj s-ro Zhu

Mingyi, eksgvidanto de ĈEL por diskuti kiel varbi pli da ĉinaj partoprenantoj al UK. Laŭ li ĝis lia alveno al Ĉinio la aliĝintoj ne superis 600, li petis ke ĈEL kaj ĉinaj aktivuloj klopodu por kuraĝigi ĉinojn aliĝi al la kongreso. Post la kunsido s-ro Nan Youli telefone kontaktiĝis kun kelkaj gvidantoj de lokaj esperantaj asocioj kaj grupoj, instigis ilin kune varbi aliĝantojn

al la UK. En la telefona kontakto s-ro Wei Yubin, direktoro de elementa lernejo Baiyangshujie en Taiyuan anoncis ke li planas sendi grupon kun ĉirkaŭ dek esperantistaj instruistoj kaj lernantoj el lia lernejo. Oni havas konfidon, ke en la seula kongresejo aperos cent ĉinoj.

Nan Youli

Festo al la Zamenhofa Tago kaj la 100-jara datreveno de la naskiĝo de s-ro Chai Zemin

Posttagmeze de la 15-a de decembro 2016, la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) kaj la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) okazigis kunvenon en Pekino por festi la Zamenhofan Tagon kaj la 100-jaran datrevenon de la naskiĝo de s-ro Chai Zemin, ĉina fama diplomato, esperantisto kaj iama prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto".

En ĝi ĉeestis ankaŭ invititoj el Tianjin, Ŝanhajo kaj aliaj lokoj de Ĉinio. La kunvenon prezidis s-ino Chen Ji, vicdirektoro de la Esperanto-sekcio de *El Popola Ĉinio*. S-ino Zhao Jun, vicĉefredaktoro de EPCĈ, unue faris salutparoladon. Poste s-ro Zhu Mingyi, veterana tradukisto kaj iama asistanta ĝenerala sekretario de ĈEL, faris prelegon pri la vivo de L. L. Zamenhof. S-ro Cao Shengqiang, direktoro de la Zaozhaung-a Universitato kaj konstanta komitatano de ĈEL, emfazis la avantaĝon de la universitato kun la Esperanto-muzeo por la disvastigo de la lingvo. Li diris, ke la universitato planas fondi fakultaton pri Esperanto por kulturi esperantistojn. S-ino Yu Jianchao, nove elektita prezidanto de PEA, poste prelegis pri Tibor Sekelj. Ŝi detale rakontis pri liaj vivo, vojaĝado, gravaj verkoj kaj vizitoj al Ĉinio. Ŝi i.a. klarigis la religiajn konceptojn kaj grandan esperon en Tibor Sekelj por ke la ĉeestantoj pli bone komprenu lian poemon "Je kies nomo?". La poemo estas rekomendita de ILEI por komuna legado de la ĉi-jara Tago de Libro/ Zamenhofa Tago. Post tiu ĉi prelego f-ino Shi Linjuan (Juana), juna esperantistino



magistriĝanta en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, faris kortuŝan kaj belan deklamadon de "Je kies nomo?". Poste s-ro Usui Hiroyuki, redaktoro de EPCĈ, kunkantis kun siaj tri Esperanto-lernantinoj la kristnaskan kanton "Paca nokto". Kun la ŝanĝo de kelkaj vortoj la kanto jam ne temis pri Jesuo, sed pri nia kara kaj estimata Zamĉjo.

Post tiu ĉi kantado komenciĝis la dua parto de la kunveno dediĉita al s-ro Chai Zemin, kiu servis kiel la unua ambasadoro de la Ĉina Popola Respubliko al Usono. S-ro Zou Guoxiang, eksa vicprezidanto de ĈEL, per sia prelego konigis al la kunvenantoj la vivon de Chai Zemin. En la prelego li rememoris pri la neforgesebla afableco, entuziasmo al nia afero kaj amzorgo al ĉinaj esperantistoj. S-ro Chai Zemin multfoje partoprenis Esperanto-renkontiĝojn,

plenforte helpis esperantistojn kaj subtenis la Esperanto-movadon en Ĉinio. Ankaŭ s-ro Wang Yanjing, eksa vicprezidanto de PEA, faris prelegon, kaj per fotoj li revokis la memorojn pri Chai Zemin. Poste s-ro Nan Youli, eksa prezidanto de PEA, laŭtlegis la leteron de s-ro Wu Tianxi, maljuna esperantisto loĝanta en Shanxi-provinco. En la letero li rakontis kiel lia vivo ŝanĝiĝis dank' al Esperanto kaj kiel Chai Zemin helpis lin tiurilate. S-ro Wu ankaŭ esprimis sian dankon al Chai Zemin kaj aliaj esperantistoj. Ankaŭ s-ro Ye Nianxian, eksa ĝenerala sekretario de PEA, kaj s-ino Tan Xiuzhu, eksa vicĉefredaktoro, respektive parolis pri siaj sentoj al Zamenhof kaj Chai Zemin. Ili konsentis pri tio, ke la spirito de s-ro Chai Zemin estis tre simila al tiu de D-ro Esperanto.

Xie Ruifeng el EPCĈ

Filmetaj Kursoj de EPCĈ

Ek de la 2-a de septembro 2015 la Esperanto-redakcio de *El Popola Ĉinio* kune kun Pekina Esperanto-Asocio lanĉis Retajn Filmetajn Kursojn de Esperanto por ĉinoj. S-ro Zhu Mingyi, eksvicĝenerala sekretario de ĈEL, kaj s-roj Usui Hiroyuki (Japanio), Rafael Henrique Zerbetto (Brazilo), la redaktoroj dungitaj de EPCĈ estis ĉefaj instruistoj de la kursoj. Ĝis fino de 2016 ili

jam faris 59 filmetajn kursojn. La kursoj taŭgas ankaŭ por fremdlandanoj kiuj deziras lerni ĉinan lingvon.

La kursoj troviĝas en la retejo de *El Popola Ĉinio* ĉe:

http://www.espero.com.cn/node_7229679_4.htm

kontakto: elpc@vip.163.com



S-ro Zhu Mingyi instruas en la video

Pekina Esperanto-Asocio okazigis printempfestan tekunvenon



La 12-an februare 2017, dimanĉe Zhengshantang-tetrinkejo en tipa ĉina loĝejo "hutongo" okazis la printempfestan tekunvenon de Pekina Esperanto-Asocio. Al ĝi ĉeestis pli ol 30 samideanoj el Ĉinio, Japanio, Sud-Koreio kaj Brazilo.

La bela tetrinkejo multe impresis ĉeestantojn. Sinjoro Rafael el Brazilo diris: "la Zhengshantang-tetrinkejo estas unu el la multaj trezoraj kaŝitaj en pekinaj hutongoj, bela ekzemplero de tipe ĉina loĝejo, kun korto en la mezo. Sur bretoj troviĝas ekspozicio de malsamaj ĉinaj teoj kaj aferoj ligitaj al te-kulturo. En la korto troviĝas arbo, senfolia pro la vintro, kiu tamen baldaŭ ekfloros kaj denove verdiĝos dum printempo. Zhengshantang ankaŭ funkcias kiel kulturdomo pri ĉinaj tradiciaj pentrarto kaj kaligrafio, sekve specimenoj de tiuj belaj ĉinaj artoj estas facile troveblaj tie, liverante al vizitanto oportunon konatiĝi kun kernaj elementoj de ĉina kulturo."

La tekunveno komenciĝis per elstara prezentado de teceremonio fare de la direktorino de la tetrinkejo, ŝtatnivela alta te-artistino, Si Ma, kies lerteco pri teceremonio miris la ĉeestantojn.

Dum la tekunveno, s-ino Yu Jianchao, prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio faris salutan paroladon, prezentis la asocian laboron en la jaro 2016 kaj la laboran planon en la jaro 2017, konigis al la ĉeestantoj la novajn estranojn de la asocio. Ŝi diris ke la kultura interŝanĝo dependas de la lingvo, kaj Esperanto kiel daŭre maturiĝanta kaj progresanta internacia lingvo grave rolas/os en la interŝanĝo. Ŝi esperas ke la membroj de la asocio daŭrigu la lernadon kaj praktikon por puŝi la kulturalan evoluon.

Por omaĝo al pola esperantisto profesoro Zbigniew Galor, kiu vizitis kune kun sia edzino Ilona Pekinan Esperanto-Asocion lastjare, brazila esperantisto Rafael Zerbetto voĉlegis la poemon de Zbigniew Galor, titolitan "Arto de vivo en paroj"

Ĉar ĵus finiĝis la tradicia ĉina nova jaro Printempa Festo, do membroj de PEA prezentis artajn programojn, ekz. Usui el Japanio, Rafael el Brazilo, Choi Manwon el Sud-Koreio kaj 3 belaj ĉininoj el *El Popola Ĉinio* kantis la faman kanton "Amikeco Eterna" per la lingvoj ĉina, portugala kaj sudkorea kaj Esperanto.

Samideano Zhang Dali prezentis la ludadon de enigmo, kaj la tetrinkejo Zhengshantang donacis bongustan brunan teon al sukcesintoj.

Estas menciinda, ke alvenis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ ne-esperantistoj, kiuj venas el la asocio de komercistoj el la ĉina norda urbeto Baishan. Ili ankaŭ prezentis

programeron – voĉlegon de ĉinaj poemoj. Ĝenerala sekretario de la asocio sinjoro Wang Yujin esprimis la volon kunlabori kun esperantistoj.

En la tekunveno membroj de PEA donis gratulan mesaĝon al la baldaŭa 300-a kurso de Seula Esperanto-Kulturcentro, kiu havos feston "memore al la 300-a Kurso de Esperanto" en la 1-a de aprilo en la jaro 2017. SEK estis fondita de Lee Jungkee en la jaro 1991 en Seulo kaj daŭriĝis sian monatan kurson preskaŭ ĉiumonate. Tra la kursoj ĝis nun 1,785 civitanoj lernis Esperanton en SEK.

Dum la tekunveno, s-ino Zhang Ping(Ĝoja), kiel unu el la organizantoj de la konkurso de mallongaj filmetoj "Teo kaj Amo" konigis la nunan progreson de la konkurso: alvenis 77 filmetoj el 27 landoj de 4 kontinentoj, kaj prezentis 4 konkursaĵojn al la ĉeestantoj.

Tekstoj kaj fotoj de Ĝoja kaj Lisha



Shandong-a Esperanto-Klubo estis fondita

En la 17-a de decembro okazis jarkunveno de la Shandong-a Junulara Esperanta Organizo kaj kunsido memore al la 157-a datreveno de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof, majstro de nia kara lingvo Esperanto. Pli ol 30 esperantistoj el Ĉinio, Japanio kaj Rusio partoprenis en la renkontiĝo.

S-ro Semio, asistanta ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj respondeculo de Esperanto-Muzeo, prezidis la kunsidon. S-ino Wu Juan, eksa prezidantino de la Shandong-a Junulara Esperanta Organizo, raportis laboron de la organizo dum la jaroj 2012-2016. S-ro Xu Shichang, asistanta ĝenerala sekretario de la Pekina Esperanto-Asocio, kaj Yang Song, kiuj diplomiĝis el la Zaozhuang-a Universitato, prelegis pri siaj vivoj en Esperantujo.

Dum la kunsido, la Shandong-a



Esperanto-Klubo estis fondita, kaj pli ol 50 esperantistoj el la provinco Shandong de Ĉinio, Japanio kaj Koreio

membriĝis al la klubo.

teksto kaj foto de Sun Mingxiao
Redaktoro Wang Lihua el EPC

Jarkunveno de Tianjin-a Esperanto-Asocio

La 11-an de decembro, 2016, Tianjin-a Esperanto-Asocio okazigis sian jarkunvenon. Ĝin ĉeestis ĉirkaŭ 40 personoj, inkluzive de invititaj gastoj el Pekina Esperanto-Asocio (PEA), esperantistoj el Ŝanhajo kaj membroj de la Tianjin-a Esperanto-Asocio. Han Daqiang, vicĝenerala sekretario de la asocio, prezidis la jarkunvenon.

Sinjorino Luan Huiqin, prezidanto de la asocio, faris raporton pri la laboroj de la asocio en 2016, kaj prezentis la laborplanon

por 2017. Ŝi esperas, ke en la venonta jaro, la asocio daŭre klopodos por disvastigi Esperanton, lernos spertojn de E-asocioj en aliaj provincoj kaj urboj, kaj plu altigos la nivelon de E-instruado por ke la asocio estu eminenta.

Sinjoro Gao Chengyuan faris prelegon kun la titolo "Esperanto kaj Akademia Esplorado". Laŭ la de si mem verkita libro *Akvo-fajro Kategorio kaj Ĉina Civilizacio*, li eksplikis la intertuŝiĝon de la kulturoj orienta kaj okcidenta. Sinjoro Cao Baozhu

prelegis sub la titolo "Kiel ludi Esperantan Rolon por Servi al la propono de Ĉinio 'La Zono kaj Vojo'". Lin Lisha (Lisa) faris prelegon titolitan "Interreto: Nova Espero por Esperanto", ŝi diskonigis la specialan rolon de la interreto en lernado de Esperanto.

Sinjorino Yu Jianchao, kiu longe esploras pri Tibor Sekelj, faris prelegon kun la titolo *Tibor Sekelj—la mondovojaĝanto revenas* (pruntpreninte el la prelego de Ŝtimeč Spomenka), konigante pri la vivo kaj verkoj de Tibor Sekelj, kaj aparte klarigis la poemon *Je kies nomo*, rekomenditan de ILEI, por la komuna legado en la Tago de Zamenhof. Laŭ ŝi, la poemo fakte esprimis la ĝenon de Tibor Sekelj en liaj lastaj tagoj de la vivo.

Sinjoro Han Zuwu, laŭ sia multjara sperto en fremdlingva instruado, prelegis kun la titolo "Pensoj pri E-instruado al Ĉinoj".

Por respondi la proponon de ILEI pri kuna voĉlegado de la poemo "Je kies nomo?" de Tibor Sekelj en la 15-a de decembro, la Tago de Libro kaj Zamenhofa Tago, post la jarkunveno, kelkaj homoj partoprenis en filmado de voĉlegado por alvoki, ke oni ofte legu kaj ĝuu la riĉan E-kulturon. Lin Lisha (Lisa) Redaktoro: Xie Ruijeng el EPC



Jarkunsido de Anhui-a Esperanto-Asocio

La 18-an de decembro en la urbo Huainan de la provinco Anhui okazis la jarkunsido de Anhui-a Esperanto-Asocio, kaj pli ol 30 esperantistoj el diversaj lokoj de la provinco ĉeestis la kunsidon. Ling Bo, prezidanto de la asocio, faris jarraporton de la asocio. Li Guoxuan, vicprezidanto de la asocio, konigis Esperanto-agadojn de la urbo Huainan dum la lastaj jaroj. Yang Haichun, konsiliano de la asocio, montris siajn spertojn pri instruado de Esperanto. Liu Baoguo, vicĝenerala sekretario de la asocio, parolis pri la Oka Azia Kongreso de Esperanto kaj la Kvina ILEI-Seminario en Orienta Azio. Ĉeestantoj ankaŭ prezentis amuzajn programerojn. Zheng Shuang, 12-jara knabino, per sinprezento kaj kanto en Esperanto, gajnis varmajn aplaŭdojn.

La jarkunsido okazis en Handaotang-a Ŝton-Kultura Muzeo. Liu Daoyuan, kuratoro de la muzeo, eksciis Esperanton antaŭ multaj jaroj kaj subtenas la idealon



de Esperanto. La muzeo estas privata. La kuratoro volas, ke la muzeo estu ejo por Esperanto-aranĝoj de la asocio, kaj

li bonvenigas esperantistojn ĉinajn kaj eksterlandajn viziti tie. Teksto de Liu Baoguo, Redaktoro: Liu Zijia el EPC

30-jariĝo de Zhejiang-a Esperanto-Asocio

Matene de la 17-a de decembro 2016 la Zhejiang-a Esperanto-Asocio okazigis kunsidon memore al sia 30-jariĝo. La kunsidon ĉeestis 17 geesperantistoj el diversaj lokoj de la provinco Zhejiang. La asocio fondiĝis la 14-an de decembro 1986 en Hangzhou, ĉefurbo de la provinco Zhejiang en sudorienta Ĉinio.

La kunsidon prezidis ĝia ĝenerala sekretario Zhu Baolong. En la nomo de la Zhejiang-a Federacio de Soci-sciencaj Rondo, s-ino Wang Shanlian faris gratulan parolon por festi la 30-jariĝon de la asocio.

Ŝi esperas, ke la asocio povos pli sane kaj daŭripove disvolviĝi.

S-ro Qiu Xirong, konstanta vicprezidanto de la asocio, retrorigardis aktivadojn de la asocio dum la pasintaj 30 jaroj. Li diris, ke ekde la fondiĝo de la asocio, ĝiaj membroj ĉiam vigle kaj entuziasme partoprenis en diversaj eventoj. Li retrorigardis, ke li kune kun aliaj membroj de la asocio partoprenis en la Unua Ĉina Kongreso de Esperanto, kaj laŭdis ke la arta trupo starigita de la asocio antaŭ 10 jaroj ludis pozitivan rolon por vaste kaj efike

diskonigi la lingvon Esperanto.

Veterana esperantisto Arbsemo, eksa ĝenerala sekretario de la asocio, prezentis la procezon de la fondiĝo de la asocio kaj montris elkoran dankon al ĝiaj fondintoj pro iliaj sindonemo kaj kontribuado por Esperanto-movado. Li diris ke kelkaj fondintoj jam forpasis, tamen estas ĉiam memorindaj. Fine li esprimis sian ĝojon pro tio ke inter la ĉeestantoj troviĝas junaj geesperantistoj, ĉar en liaj okuloj junuloj estas espero de nia Esperantujo.

Ĝia vicprezidanto Gong Dufa subtenas laborojn de la asocio per diversaj manieroj kaj esperas, ke la asocio havos brilan perspektivon. Kaj ankaŭ aliaj estraranoj de la asocio kun granda emocio parolis pri siaj agadoj dum la pasintaj 30 jaroj por disvolvi Esperanton. Ĉielia, reprezentante junulojn, elmetis novajn pensojn kaj ideojn, ŝi diris, ke junuloj malesperigos neniel la maljunajn esperantistojn, konservas bonan tradicion kaj plibeligos la estontecon de la asocio per sia diligenta laboro. Kvankam la vetero estis malvarma, la etoso estis vigla, kaj la kunsido finiĝis en varma entuziasmo de la kunsidantoj.

Teksto de Verdeca,
Redaktoro: Wang Lihua el EPC



Vizito al veteranaj Esperantistoj antaŭ la Printempa Festo

De maldekstre starante: Zhang Ping, Yu Jianchao, Wang Jinyu, Nan Youli kaj Zhang Yongle



vizito al s-ro Liu Ling(sidanta)



vizito al s-ino Tan xiuzhu(dekstre)

La 22-an de januaro, antaŭ Printempa Festo, estraro de Pekina Esperanto-Asocio, kun honora prezidanto s-ro Nan Youli, prezidantino s-ino Yu Jianchao, vicprezidanto s-ro Wang Yujin, ĝenerala sekretario s-ro Zhang Yongle, dua ĝenerala sekretario fraŭlino Zhang Ping (Goja), vizitis 11 konatajn veteranajn esperantistojn loĝantajn en Pekino. Laŭvice ili estas: eksparolisto de ĈRI s-ro Liu Junfang, eksĉefsekretario de ĈEL s-ro Liu Ling, eksparolistino s-ino Li Yuping, fama historiisto de Ĉina E-movado s-ro Hou Zhiping, eksredakto s-ro Zhan Xuede, eksa gvidanto de PEA s-ro Zhang Haiping, kiu ripozas en sanatorio, membro de Esperanto-Akademio s-ro Xie Yuming, iama ĉefo de Ĉina Administrado de Fremdlingvaj Eldonaĵoj s-ro Zhao Changqian, iama prezidanto de ĈEL s-ino Tan Xiuzhu, kaj je la fino, kiam proksimiĝas

meznokto, oni atingis hejmon de s-ro Ye Nianxian, eksĉefsekretario de PEA. S-ro Zou Guoxiang nun ricevas kuracadon en hospitalo. Oni petis liajn familianojn transdoni saluton. La estraro de PEA kore dankis la vizititojn pro ilia sindonema kontribuo al Esperanto-Movado de Pekino, kaj sendis al ili bondeziron de Printempa Festo. Oni deziras al ili sanon, longan vivon kaj agrablan ĝuon en Esperantujo. La vizitado kortuŝis la veteranajn esperantistojn. Ili sincere deziras pli grandan sukceson al laboro de PEA.

En la telefona intervjuo fare de redaktoro de *Tra la mondo*, honora prezidanto s-ro Nan Youli diris, ke viziti kaj saluti famajn veteranajn esperantistojn en Pekino estas tradicia agado de PEA, kiu daŭras jam dekelkajn jarojn. *Nan Youli, fotoj de Zhuang Yongle*



vizito al s-ro Liu Junfang(maldekstre)



vizito al s-ino Li Yuping kaj la edzo(1a 3-4a dekstre)



vizito al s-ro Ye Nianxian(meze)



vizito al s-ro Zhan Xuede(meze)



La Komuna Staĝo de Koreaj Kaj Tajvanaj Esperantistoj

La 9-an ĝis 12-an de februaro okazis korea-tajvana komuna staĝo en Nord-pingtung-a Komunuma Kolegio, kie ni okazigis kurson de Esperanto ĉiulunde vespere du horojn. Ĉirkaŭ 40 personoj ĉeestis en la staĝo, inkluzive de 9 koreoj, 2 francoj, s-ino Claudine kun sia edzo, kiuj hazarde estis vojaĝantaj en Tajvano, kaj la aliaj lokaj esperantistoj, aŭ amikoj de Esperanto, kiuj aŭ kontribuis la programon, aŭ akceptis gastojn ĉe flughaveno, aŭ preparis manĝojn por gastoj ktp, kun riĉa programaro ni pasigis agrablan tempon dum kvar tagoj.

La staĝo estis lanĉita de Esther (Hyun-mi Lee) de Esperanto-Sarangbang en Koreio. Por sukcesigi la staĝon, la organizantoj Esther, Hela (Jung-hee Lee), Minmin (Hyeon-kyeong Min), Oazo (Nam-sook Lee) de Koreio, kaj Liru Chen, Ingrid (Yinhua Chuang), Reza Kheirkhah de Tajvano skajpe diskutis ĉiudusemajne ekde septembro en 2016. Jen la detaloj:

La 9-an de Feb. vespere en arta-studio Ho-mi okazis prelego de Esther kaj Hela, pri Esperanto-staĝo de LLG (liberigitaj lernejoj por gelemantoj en Koreio) kaj venonta UK kaj IJK en Seulo. Ĉirkaŭ 18 personoj ĉeestis por aŭskultado. Du gastoj estis akceptitaj senpage tranokti ĉe la arta-studio.

En la sekvanta tago, matenmanĝinte ĉe la matenmanĝejo de loka esperantistino, Anjur, nia staĝo komenciĝis. Je la inaŭguro, la ĉef-estro de Nord-pingtung-a Komunuma Kolegio s-ino Guo Hui-sin kaj la direktorino kun sekretario Chiu Yi-rong ĉeestis por salutado, kaj interŝanĝi donacojn kun Esther, reprezentanto de LLG.

Dum la lingvo-interŝanĝo, Liru prezentis pri ok tonoj de la tajvana lingvo kun gesto, Minmin klarigis regulon de la literumado de la korea, ankaŭ ni lernis la salut-vortojn de la ĉina, tajvana, kaj la korea.

Ni kantis kelkajn kantojn ekz. "Nubo", "Iun Oktobran belan tagon", "Mi estas milo da vento" laŭ la gvido de Esther, kaj la

tajvanan popolkanton "Sopirante printempan brizon" esperante, laŭ la gvido de Liru, kun gitar-ludado de Chuying, juna tajvana esperantisto.

Poste ni ludis karto-ludon por lernado de Esperanto laŭ la gvido de Hela kaj Minmin. Samtempe loka esperantisto Kevin (Hua-en Shih) faris arom-karton por kuracado de korpo kaj menso.

Posttagmeze Liru kaj Ingrid akompanis 9 koreojn, kaj du francojn al Kaohsiung, kie bona ĉiĉerono Prof. Abengo estis atendanta nin ĉe stacidomo por duontaga ekskurso. Laŭ la gvido de Abengo, ni vizitis la belan metrostacion "Formoza Bulvarado" kun lumiĝa kupolo de vitra pentraĵo, la pli ol tri cent jara Templon Mazu en la insuleto Ĉiĝin, kaj la Templon Generalo Guan, kie okazas testudo-oferaĵo dum lanterna festivalo; sur la tablo troviĝas diversaj testudoj faritaj de diversaj materialoj. Poste ni spektis ekspozicion de la lanternoj, promenante laŭ la amo-rivero, kaj gustumis manĝetojn ĉe la nokta bazaro.

Reveninte al Pingtung, koreaj esperantistoj vizitis la pied-masaĝejon de Kevin por forigi lacecon. Ha ha, dum la pied-masaĝado ĉiuj dormis.

La 11-an de Feb. malgraŭ ĉiuj estis iomete timigitaj de tertremo je frumateno en

Tainan, ne fore de Pingtung, partoprenantoj ankoraŭ alvenis al klasĉambro ĝustatempe.

Komence por tinkturado ni bonvenigis S-ron Bohan, kiu estas instruisto de indiĝena metio. Laŭ lia gvidado, ĉiuj ĝuis la tinkturadon. Dum koloro-fiksado de tinkturado, ni gvidite de Esther, mane al mane ĉirkaŭante en cirklo, ĝojplene kantis kaj dancis laŭ tradicia korea danco "Gang-gang-sule". Poste, Oazo prezentis Jut-ludon (Jutnori), kiu estas la plej malnova kaj populara el tradiciaj ludoj de Koreio. Lucida (Hye-sook Cheong) kaj Stela (Jin-young Lee) montris al ni kiel ludi. Poste ni daŭrigis la tinkturadon. Lavinte la kolorigitan tukon, ĉiuj surpriziĝis pri ĝia beleco. Ŝajnas al mi, ke ĉiuj estas talentaj artistoj. Tagmanĝinte ni dividiĝis en du teamoj por konkurso de Jut-ludo, kiu tre amuzis nin. Ludinte ni ricevis tutajn ludilojn de Jut-ludo kiel donacon.

Posttagmeze ni moviĝis al hejmo de Reza por kuirado. Antaŭ ol kuirado, ni invitis s-ron Min, kiu estas bakisto kaj antaŭe laboris en hotelo kiel administranto. Li parolis pri etiketo de manĝado, interpretis esperante Liru. Poste Lucida, Stela, Sera (Bo-ae Kang) kaj Minmin ekpreparis koreajn manĝaĵojn, kelkaj materialoj eĉ estis enportitaj el Koreio. Loka esperantistino Sofia (Lan-chiu Huang) kuiris tajvanajn



Tinkturado



manĝaĵojn, helpe de Majo (Huei-mei Wang), unu el la gastigantoj. Je la 6-a vespere ni estis pretaj por vespermanĝi. Diversaj bongustaj manĝaĵoj estis sur la tablo. Manĝante, oni daŭre aŭdis "bongusta bongusta" senĉese.

Manĝinte, ni iris spekti ombro-ludon, kiu hazarde okazis en lanterna festo. Estis rara ŝanco, ke oni ne nur povis spekti la teatraĵon sur la ekrano, sed ankaŭ antaŭ la ekrano sur la tero, kaj post la ekrano ludistoj montris kiel funkciigi la lud-pupojn. Gabi, filino de Hela ankaŭ provis la ludadon. Fine ni kune fotiĝis sur la pejzaĝo-ponto por hodiaŭa adiaŭo. Menciinde alvenis ĉe ni, Richard, aŭstralia juna esperantisto, kiu laboras en Kaohsiung.

Amuza tempo pasis rapide. Jen estis la lasta tago de nia staĝo. Unutaga ekskurso temis pri indiĝena kulturo.

Laŭ la aranĝo de Liru, unue ni vizitis la pendoponton, kiu estas la plej longa pendoponto en Tajvano, je 262 metroj longa, proksimume 45 metroj supergrunde. Nun ĝi fariĝas populara vidindaĵo kaj estis konstruita antaŭ du jaroj, kun totemo de serpento kaj vitra-bidoj de indiĝeno, pro tio ke la malnova ponto konstruita de japanoj kun historio de 70 jaroj estis detruita de la tajfuno Morakot en la jaro 2009.

Poste ni iris al Tajvana Indiĝena Kultura Parko. La granda kaj vasta parko situas en monta areo de 145 ĝis 220 metroj super marnivelo, kies natura pejzaĝo estas bela kaj diversa. Ni prenis la turneo-trolebuson al la rondforma teatro Naruŭan por spekti la spektaklon. La brilaj kostumoj kun buntaj akcesoraĵoj kaj dinamikaj kantado kaj dancado profunde impresis amikojn el eksterlando. La prezentistoj ankaŭ invitis spektantojn sur la scenejon lerni indiĝenan dancon kaj kune danci.

Poste ni tagmanĝis en la fama indiĝena restoracio Da-ji-fa-li. Entute ni gustumis 12 pladojn da bongustaj manĝaĵoj kun deserto. En la restoracio estis elsendita la

KD de Espero-koruso de indiĝenaj infanoj, kies muziko tre plaĉas al Oazo. Sciĝinte, ke la KD nur estas donacita al tiuj, kiuj kontribuis por subteni la edukadon kaj disvolviĝon de la Espero-koruso, ŝi tuj faris monokontribuon. Tiel la instruistino de la koruso kaj mastrino de la manĝejo fariĝas amikoj de Esperanto.

Tagmanĝinte, ni piediris al studio de vitra-bido. Por indiĝenoj la vitra-bidoj estas trezoro, aparte la malnovaj, kies diferencaj figuroj havas malsamajn signifojn. Laŭ la gvido de artistoj, ĉiuj gastoj faris sian propran kolieron per vitra-bido kiel memoraĵon.

poste ni veturis al indiĝena elementa lernejo, nome Evergreen Lilio, ĉar la lernejo estis konstruita de Evergreen Entrepreno por lernejoj el tri indiĝenaj triboj. La lilio estas simbolo de Rukai etno. La direktoro de la lernejo simple klarigis, ke la lernejoj ankaŭ lernas sian patrinan lingvon en la lernejo. Tie troviĝas multe da belaj porĉiamaj domoj por indiĝenoj el la tri triboj, kiuj pro la atako de tajfuno Morakot kaj terura inundo, ne plu povas vivi sur la montaro. Ĉe la ekstera podio de la lernejo, loka esperantistino Yvonne (Ya-wen Chen) instruis jogon. Ĉiuj kun granda ĝojo praktikis tri pozojn.

Antaŭ ol reveni al urbo Pingtung, ni

vizitis ananaso-kampon, kaj gustumis freŝan ananaso-sukon kaj sekigitan ananason. Je la 6-a vespere ni alvenis al Junula Kolegio por ripozo kaj vespermanĝo. Je la 7-a okazis prelego de komencanto Louii (Yong-lun Shiau), kiu temis pri moro de ĉina novjaro, esperante interpretis Ingrid. Per kvizo li donacis al gastoj novjarajn ornamaĵojn.

Poste la grupanoj de Tajvana Opero en Nord-Pingtung-a Komunuma Kolegio prezentis unu ĉapitron el la populara rakonto *Legendo de blanka serpento*, nome "Vojaĝante ĉe la lago, prunti ombrelon". La mirinda prezento tiel profunde altiris niajn gastojn, ke ili ŝajne ne bezonis la esperantan subtitolon, kiun Ingrid tradukis kaj ĝi aperis sur ekrano samtempe kun la ĉinaj paroloj. Kun la boatisto en la opero ni gaje kune kantis "e-a-lo-di-e, e-a-lo-di-e, esperante". Fine, Reza preparis ruĝa-kovertojn kun irana monbileto por la aktorinoj, kunlaborantoj kaj gastoj.

Ni kore dankas al tiuj, kiuj kunlaboris, aparte Liru, kies eĉ ĉiuj familianoj helpis por sukcesigi nian staĝon. Dankon al Esperanto-Sarangbang, pro tio ke dum la staĝo proponita de ili ni multe lernis. Dankon al la paca, amikeca lingvo, Esperanto.

Ingrid (Yinhua Chuang) el Tajvano



Esperanto-atingaĵoj en Herzberg am Harz 2016

■ *Zsófia Kóródy (Germanio)*

Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo en Germanio estas unikaĵo en la mondo, ja la unuan fojon okazas, ke laŭ subskribita kontrakto inter Esperanto-asocio kaj iu urba gvidantaro jam de 10 jaroj daŭras uzado de Esperanto en pluraj terenoj, ĉefe en rilatoj kun la ĝemelurbo Góra en Pollando, en kultura agado kaj instruado kaj eventoj por la junularo. Tiu kunlaboro kaj kunagado ankaŭ kun aliaj lokaj asocioj, diversaj interesgrupoj enhavas ankaŭ aktivaĵojn por aldoni videblajn, uzeblajn Esperanto-servojn en la urbo. Ni strebas vidigi Esperanton dise en la urbo, krei daŭripovajn Esperanto-rilatajn objektojn kaj aldoni la lingvon Esperanto ankaŭ tie, kie ĝi servas kiel internacia komunikilo, turisma informilo, ktp.

Tiuj agadoj estas parto de ĉiujara pri-pensita laborplano, akordigita regule inter la partneroj kaj realigata laŭ disponebla buĝeto, laborforto.

Ni provas koncize informi pri la plua Esperanto-evoluigo en nia urbo dum la jaro 2016. La listo ne estas kompleta, sed tamen servas iom al informado.

1) Estis pretigitaj kaj fiksataj 12 ŝildetoj en Esperanto pri ĉerizspecoj en Juesholzstrato (tiel nomata ĉeriz-aleo proksime al Vilao Juesheide). La projekto estis realigita en kunlaboro kun loka agadgrupo Zukunftswerkstatt kaj dank' al ricevitaj sponsoroj.

2) 'Rozo de la Espero' (rozo oficiale registrita kun la nomo Rose der Hoffnung) estis plantita en la interna korto de la

urbodomo far urbestro Lutz Peters kaj urbestrino de Góra Irena Krzyszkiewicz okaze de la 10-jara jubileo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo. Malantaŭ la planto sur la muro dulingva ŝildeto (en la germana kaj en Esperanto) memorigas pri la evento en 10.07.2016.

3) 9 novaj dulingvaj turismaj vojmontriloj estis instalitaj en la urbocentro kun la tekstoj (Wasserfall - Akvofalo, Zentrum - Urbocentro, Fußgängerzone - Piedira zono, Busbahnhof - Centra busstacio). Ili estas bone, publike videblaj, estas kaj longdaŭre restos bonegaj informiloj de la internacia lingvo Esperanto.

4) Informtabuleto pri la historio de la Welf-kastelo estis pretigita kaj fiksita sur la muro ĉe la enirejo al la kastelo (enireja arko). Ĝi klarigas al la turistoj en la angla lingvo kaj en Esperanto. Ni dankas al Dana Esperantista Fervojisto-Asocio (DEFA) pro sponsorado!

5) 4 Esperanto-benkej aldoniĝis al la t.n. benko-vojo en Herzberg. Ekde jaroj ni laboradas por krei kaj oferti al vizitantoj itineron, kie ili povas promeni kaj survoje trovi benkojn, kiuj havas Esperanto-rilaton, ĉar estis donacitaj de Esperanto-amikoj, sponsoritaj de Esperanto-klubo, asocioj. Jen la novaj objektoj, kiuj aperis en la lasta jaro:

- ŝtonbenko en Domeyerpark (antaŭe ĝi staris en la atendejo de la stacidomo).

- benko en Domeyerpark honore al Elfriede Kruse (dank al Germana Esperantista Fervojista Asocio GEFA).

- benko ĉe la enirejo de la kastela muzeo

(dank al DEFA).

- benko ĉe la piedira vojo proksime al la Welf-kastelo (dank al DEFA).

6) Plantado de 2 fruktarboj (kun Esperanto-ŝildetoj) ĉe la tiel nomata Vinmonto en Herzberg enkadre de la projekto "Engaĝita urbo". La projekton iniciatis la loka agadgrupo Zukunftswerkstatt kaj partoprenis en ĝi kiel partnero Interkultura Centro Herzberg. La Esperanto-amikoj post la plantado fiksas ŝildeton sur la arboj kun la teksto „Esperanto-arbo”.

7) Ekspozicio pri Esperanto & ekslibrisoj. En la Kastela Muzeo ĉiujare ni ekspozicias Esperanto-rilatajn materialojn. Tiu ĉi nuna montras interesajn etajn art-verkojn trovitajn en libroj de la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg, aldone ni prezentas ankaŭ kelkajn aliajn ekslibrisojn el Germanio kaj aliaj landoj.

8) Estas ĝojige, ke ni trovis subvencion por eldoni dulingvan fotolibron memore al la dekjara jubileo de "Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo". Ĝi enhavas bildkronikon de la lastaj dek jaroj inter 2006, la eksto de Esperanto-urbo ĝis 2016, la dekjara jubileo, prezentante multajn branĉojn de la agado de la Esperanto-Centro kaj la atingajojn, kiuj rezultis, ke ekz. en Herzberg am Harz - la Esperanto-urbo videblas jam pli ol 200 publikaj esperantlingvaj vojmontriloj, ŝildoj, objektoj, tabuloj, murpentraĵoj, ktp.

Al interesigantoj ni volonte donas ekzempleron!

(Titola bildo: gastoj ĉe informtabulo en la kastelo)



Germana Esperanto-Asocio – Filio por Klerigado & Kulturo

Somera Esperanto-Perfektigo

Speciala somera oferto



09-22.07.2017

Esperanto-lingvokursoj

- *Komencantoj*
- *Progresintoj*

2x1-semajna instrukapabla klerigmodulo por instruemuloj

Programoj

Ĉiutage: 6 instruhoroj (de lundo ĝis sabato).

• Posttagmeze: Vizitoj, gvidadoj, ekskursoj, naĝado, biciklado, promenado, festoj, ktp.

• Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, interparoloj, literaturo, ekskursoj.

Kostoj

Kurskotizoj: 1 semajno 100,00 €, 14 tagoj=165,00 €

Rabatitaj prezoj: ekz. por gestudentoj! Eblas kelkaj stipendioj, bv. demandi!

Tranoktebloj

Ni peras por vi!

1) favorpreza Esperanto-tranoktejo 12,00 €.

2) hotelo (3-4-stela, kun matenmanĝo) 35-60 €.

3) Privata apartamento (se min. 2 personoj) ĉ.20 € persono/tago.

4) en propra tendo: senkosta.

Aliĝilo eĉsultebla ĉe <http://reto.cn/provizora/sep2017.zip>

Kontakto :

Interkultura Centro Herzberg
Grubenhagenstrato 6,
DE-37412 Herzberg am Harz-
la Esperanto-urbo, Germanio.
Tel. 05521-5983

esperanto-zentrum@web.de
www.esperanto-urbo.de



Germanio kaj Ĉinio kunlaboras por eldoni la revuon *Tra la mondo* fariĝas senpaga

En la 1-a numero de *Tra la mondo* la redakcio anoncis ke la revuo estas senpaga al ĉinaj aktivuloj, ke la reta versio por abonantoj estas 6 eŭroj, kaj la papera versio estas 26 eŭrojn jare. Post la apero ni fakte tuj senpage donacis la unuan numeron al ĉiuj legantoj.

Ekde nun, Interkultura Centro Herzberg (ICH) el Germanio kaj Esperanto-Centro Ora Ponto decidas kunlabore eldoni la revuon *Tra la mondo*. Post la kunlaboro la du eldonantoj decidas ke la reta versio estas senpaga al ĉiuj. La reta versio estas senpage havebla ĉe la du centroj. Nur la papero-versaj bezonantoj pagos la bazan koston. Mondonaco por subvencii la eldonadon estas bonvena. La donaco bv iri al uea-konto: "huyi-j" kun indiko "donaco al *Tra la mondo*".
Bonan legadon al ĉiuj!

Peter Zilvar

Direktoro de Interkultura Centro Herzberg

Trezoro Huang Yinbao

Direktoro de Esperanto Centro Ora Ponto



S-ro Peter Zilvar (dekstre), direktoro de ICH en Germanio speciale hisinte ĉinan kaj Esperantan flagojn akceptis s-ron Trezoro Huang Yinbao (meze) el Ĉinio

Internacia Kolegio de Nova Silka Vojo serĉas instruistojn el Esperantujo

Internacia Kolegio de Nova Silka Vojo de Wuhan Teknologia & Komerca Universitato serĉas instruistojn el Esperantujo tutmonde.

• Instruistoj de komerco, angla lingvo kaj angla literaturo.

• Instruistoj de franca, germana, hispana kaj itala lingvoj.

• Instruistoj de hotela administrado.

Postuloj por kandidatoj:

• Bakalaŭro aŭ supre.

• Instruada sperto.

• TESOL / ESL diplomo.

• Sana korpo; senpretenda, optimisma kaj kunlabora.

• Sub la aĝo de 60j.

• disponebla de la unua semajno de septembro 2017.

Dokumentoj bezonataj:

• Fotokopio de la nuna pasporto dum ĝia efika dato.

• Fotokopioj de la bakalaŭro-atestilo.

• Viva resume (CV) kun la nomoj kaj kontaktinformoj de du arbitraciistoj.

• TESOL. diplomo (aŭ angla atesto).

• Referenco-letero de la nuna aŭ la plej lastatempa dunganto.

• Raporto de la lasta korpa ekzameno.

• Nova portreto.

• Pruvo pri senkrimo.

laborŝarĝoj kaj Salajro, Bonaĵo:

• Instruado-horo: 16 lecionhoroj por semajno.

• Monata Salajro: 7000RMB kaj supre depende de sperto kaj kvalifiko.

• Vojaĝado-Subvencio: 2200RMB jare Ĉine.

• Vojaĝado-Subvencio: 11000RMB jare Internacie.

• Senpaga loĝado: apartamento kun mebloj kaj instalaĵoj inkluzive de televido, AK (alterna kurento), kaj senpaga interneta konekto.

• Senpagaj ĉinlingvaj klasoj.

• Senpagaj seminarioj pri instruado-disolviĝo.

Vizo-peta proceduro:

Antaŭ alveno al Ĉinio

• Instruistoj devas liveri la dokum-

entojn postulatajn, kaj kopion de la projekta kontrakto subskribita.

• Ni petos laborpermesilon ĉe loka eksterland-fakula administra buroo en Ĉinio por vi.

• Ni petos invitolon ĉe loka fremdland-afera oficejo en Ĉinio por vi.

• Ni sendos al vi la originalajn laborpermesilon kaj invitolon.

• Instruistoj mem petos laboran vizon (Z) en ĉina konsulejo en sia lando.

Post alveno al Ĉinio

• La invititaj instruistoj registriĝu ĉe loka policejo ene 24 horoj post alveno.

• Ni aranĝos por la instruistoj korpan sanan ekzamenon surloke.

• Ni aĉetos sekurecan asekuron por vi.

• Ni petos la ĉinan spertan atestilon de fremdulo por instruistoj.

• La instruistoj petos restadpermeson.

Kontakto: s-ro. Davido kaj s-ino. Lea, Tel: 0086-27-88147160 aŭ 0086-27-88147361;

Faksio: 0086-27-88147361, bicewtbu@foxmail.com, www.wtbu.edu.cn.

Esperanto-Centro Ora Ponto serĉas volontulojn

Esperanto-Centro Ora Ponto, kiu troviĝas en urbeto Jingchuan de Pingliang urbo, kun 100 mil urbanoj kaj 250 mil kamparanoj, en nordokcidenta Ĉinio. La centro havas du profesiajn esperantistajn laborantojn kaj kvar lokajn esperantistajn kunlaborantojn.

La centro deziras gastigi fremdlandan E-parolanton kiel volontulan helpanton. La ĉefa tasko de la helpanto estas: konversacii kun lokaj komencantoj por paroligi ilin. Se la helpanto konsentus, ni proponus ke li/ŝi fariĝu kunredaktoro de la revuo *Tra la mondo* por provlegi kaj modifi malneton de la revuo.

La volontulo mem libere decidus la helpan tempon, kaj povos fari proprajn laborojn en la centro. Ni proponas 10 laborajn horojn semajne, se li/ŝi konsentus. En libera tempo lokaj komencantoj povos akompani lin/ŝin por vojaĝi en aŭ ĉirkaŭ la urbeto. La volontuloj povos resti en la centro de kelkaj tagoj ĝis tri monatoj. Pli longa restado estus bonvena, se li/ŝi povus akiri validan vizon.

La centro liveros al la helpanto senpagajn loĝejon, tipan familian manĝaĵon ĉe lokaj esperantistoj, kaj bonan laboran kondiĉon en la centro. Ankaŭ esperantistaj turistoj estas bonvenaj. Al ili ni liveros senpagan loĝadon. Interesantoj kontaktu s-ron Trezoro Huang Yinbao, trezoro@qq.com kaj agrikulturo@126.com.



Kolegio de Nova Silka Vojo de Wuhan
Teknologia & Komerca Universitato

komenciĝas voĉdonado por “la plej ŝatataj filmetoj” Videblas konkursaĵoj por “Teo kaj Amo”

Nun videblas la filmetoj por la dua konkurso "Teo kaj Amo" ĉe <http://esperanto.cri.cn/teokajamo2016/filme.htm>, kaj komenciĝis voĉdonado por la 10 plej ŝatataj filmetoj, bonvolu viziti la paĝojn kaj doni viajn voĉojn.

Danke al apogado kaj subtenado de Esperantujo, la kolektado de konkursaĵoj por la dua konkurso "Teo kaj Amo" ricevis tre bonan rezulton: 77 filmetojn el 27 landoj de 4 kontinentoj – Argentino, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉinio, Ĉilio, Francio, Germanio, Italio, Indonezio, Kazahio, Kolombio, Kubo, Litovio, Nepalo, Pollando, Rusio, Turkio, Svedio, Svislando, Sud-Koreio, Slovakio, Ukrainio, Usono, Uzbekio, Venezuelo, Vjetnamio kaj Kongo (D.R.). Dume pri la konkurso raportis amaskomunikiloj en

Malajzio, Litovio, Ĉeĥio kaj Ĉinio. Ankaŭ pli ol dukdek landaj, regionaj, urbaj Esperanto-organizaĵoj multe helpis kaj subtenis la konkurson.

Nun 8 membroj de la ĵurio laboras por la rezulto de premioj, aprile oni anoncos la rezulton kaj oktobre la premioj senpage partoprenos en la filmfestivalo "Teo kaj Amo" en Ĉinio.

Freŝaj informoj kaj progresoj de la konkurso videblas ĉe https://www.facebook.com/groups/817633741655742/?fref=tshttps://vk.com/teo_kaj_amo kaj https://twitter.com/Teo_kaj_Amo.

Se vi havas iun ajn dubon aŭ problemon bv. sendi mesaĝon al perfectgoja@163.com aŭ filmkonkurso2015@163.com.

Teksto kaj bildo de zhang Ping(Ĝoja)



Ĉina Radio Internacia invitas vin al la rubriko "Kampo de Literaturo"

Ekde la unua de aprilo de 2017 la E-redakcio de Ĉina Radio Internacia (ĈRI) havas sian lokon ekskluzive por la nova literatura rubriko *Kampo de Literaturo* (KL).

Estas bonvenaj ĉiuj esperantistaj verkemuloj kaj tradukamantoj. Se vi havas iun ajn manuskripton, legindan por la publiko, dividendan por aliaj, ne hezitu sendi ĝin al la skipo de KL. En KL estas diversaj branĉoj por originalo kaj traduko: poemo, novelo, fabelo, rakonto, eseo, recenzo (por rekomendi bonan libron literaturan aŭ dividi vian penson pri ĝi). KL uzas litergrandon 14 en la teksto de la kontribuado kaj litergrandon 16 en la titolo; la litertipo estas Times New Roman. La partoprenaĵo, prefere, ne estu tro longa. Vian kontribuadon kiel aldonan dosieron en la formato .doc de Word, kun unikodaj supersignoj, bv. sendi al espradio@cri.com.cn kaj samtempe al xionglimpingesp@163.com. Pri ĉia problemoj vi turnu vin al tiuj du retpoŝtaj adresoj.

Bv. indiki ĉe la komenco de via teksto, al kiu branĉo ĝi apartenas; kaj ĉe la fino vian personan informon pri la nomo, sekso,

aĝo, nacio kaj persona foto (kompreneble, se vi konsentas ĝin montri en via aperigaĵo).

Reguloj de premio: Ekde aprilo de 2017 en ĉiu tria monato KL havas tri plej elstarajn kontribuantojn, kiujn KL premias per po unu ĉina libro esperantigita aŭ io alia, pli malpli valora. Ĉiuj premioj, kiel furoruloj, sidas en la rangolisto trimestra. Tiuj premioj naskiĝas tiamaniere: la sistemo de la retejo aŭtomate aperigas ses plej ofte legitajn aŭtorojn, inter kiuj KL ellotas tri. Tiuj tri do estas premioj. Nur tiuj homoj, kiuj ne gajnas la premion dum la ses tuj antaŭaj monatoj, rajtas partopreni en la premio. Ne eblas jura traktado al la rezulto de la aljuĝo. Kaj KL havas specialan premion, kiu nomiĝas "Bravulo". Iu ajn, se li/ŝi kontribuas almenaŭ unu manuskripton aperigitan en ĉiu monato dum la tuta jaro, aŭtomate ricevas la premion "Bravulo". Al li/ŝi KL donacas ankaŭ ĉinan libron esperantigitan aŭ ion alian. Kaj cetere, tiuj "bravuloj" eniras en nian honorejon.

Oni regule disaŭdigas en radio bonajn elektitajn el la kontribuadoj.

Aparte oni devas atenti: La kopirajt-

demandon la KL-skipo ne traktas. Do ĉiuj verkoj devas esti originalaj, kaj ĉiuj tradukoj devas ne havi demandon pri kopirajto.

La partoprenanto havas kopirajton pri sia kontribuado, sed li/ŝi konsentas senkondiĉe cedi ĝin al la KL-skipo, kiu havas rajton eventuale publikigi lian/ŝian verkon aŭ tradukon libroforme aŭ/kaj en iu alia formo – kompreneble ne por komerca celo.

Kaj laste, ankaŭ necese, la skipo de KL petas, ke vi kopii la ĉi-subajn vortojn ĉe ĉiu via sendaĵo: Mi mem konsentas senkondiĉe cedi mian manuskripton al la skipo de *Kampo de Literaturo* por ĝia uzado, kun celo de bono, sed ne de komerco.

Sukceson kaj progreson al vi en *Kampo de Literaturo*!

La skipo de *Kampo de Literaturo* en la E-redakcio de ĈRI

Retadreso:

espradio@cri.com.cn,

xionglimpingesp@163.com

(Nepre sendu samtempe al la du retadresoj.)

Impreso pri Ĉinio En la okulo de Korea esperantisto Lando de Fajroludo

■ BAK Giwan (koreo, 15 jarojn loĝanta en Ĉinio)

Unu el miaj ĉinaj esperantistoj-amikoj diris al mi, ke Ĉinio estas 'lando de bankedo'. Jes, tion mi samopinias. Sed laŭ mi la unua impresiva trajto de Ĉinio estas la 'fajroludo', kiun koreoj ordinarie nomas 'eksploodobambuo'.

En la printempa festo, 2003, mi unuafoje spertis ĝin en la nordorienta urbeto Yanji en Ĉinio. Mi ne povas forgesi la vesperon. Ne, ne la vesperon, sed la tutan nokton, verdire. Mi tute ne povis dormi la nokton. Antaŭe mi jam de longe aŭdis, ke en printempa festo ĉinoj tre multe kaj furore ludas la 'fajroludon'. Sed la vespero multe pliis ol mia antaŭvido. Ĝi ne estis festo. Ĝi devus esti milito. Fakte mi ne memspertis realan militon. Sed per diversaj manieroj

mi bone scias, kia estas milito, kia estas la sono de milito. Sed en tiu nokto la sonoj multe superis mian supozon. Sonoj de pafiloj, bomboj, kanonoj, raketoj, eĉ sonoj de tondregoj! Ho, orelpike, orelŝire, oreltranĉe!

Kaj la ludo daŭris ĝis la tago de 'Plenluno', unu el la festotagoj, kiun ĉinoj kaj koreoj, eble ankaŭ multaj azianoj celebras en la 15-a tago de januaro laŭ luna kalendaro. Ne nur en la noktoj, sed eĉ dum la tagoj oni de loko al loko ĝuis tiun fajroludon. Tre impresiva!

Mi aŭdis, ke oni elspezas multan monon por la ludo, tiel efemera. Kaj mi aŭdis ankaŭ, ke la ludantoj deziras per la ludo ĉielan benon unu jaron daŭrantan.

En la transjara nokto de 2007-2008,

laŭ luna kalendaro, mi kaj mia edzino memŝofore vojaĝis en Shanhaiguan, la marborda urbo de la provinco Hebei, kie komenciĝas la Granda Muro. Tie ni renkontis ian maljunan avon kun malgranda nepo ĉe la marborda vilaĝo. Ili havis ĉe manoj kelkajn fajroludilojn - petardojn. En malluma vespero neniu estis sur la vojeto krom ili kaj ni. La avo kaj la nepo fajroludis kune. Ĝi estis tute ne militeca, sed tre familieca kaj eĉ pacoplene aminda. Mi kaj mia edzino longe vidis la scenon kaj ni kune ĝuis la ludon en nia koro, tre bele harmoniigantan kun la ĉirkaŭanta mallumo tuj apud la maro. Mi ne povas forgesi la pitoreskan scenon de tiu nokto ĉe la marbordo de Shanhaiguan. Iam mi volas reviziti la vilaĝon.

Konsilia kunveno de Xinxiang-a Esperanto-Asocio

La 21-an de januaro okazis kunveno de la konsilio de Xinxiang-a Esperanto-Asocio en la provinco Henan, meza Ĉinio. En la kunveno, la estroj de la asocio resumis la laborojn de 2016 kaj faris planon por la kuranta jaro. La kunveno estis prezidita de profesoro Gao Qi, vicprezidanto de la konsilio. En ĝi parolis Liu Jiahe, konsilia prezidanto, Wang Baosheng, ĝia vicprezidanto, kaj Jia Rongxia, ĝia ĝenerala sekretario.

En 2016, la asocio finplenumis du taskojn: unue, ĝi partoprenis en la Esperanta forumo de kvin provincoj kaj urboj, okazinta en Hangzhou. En ĝi membroj de la asocio estis premiitaj pro siaj artikoloj kaj prezentadoj; due, ĝi organizis en sia urbo la unuan Esperanto-kongreson de la provinco Henan, tio estis alte taksata de ĝia supera organizo Henan-a Esperanto-Asocio. Tiu aktivado antaŭenpuŝis la E-movadon de la tuta provinco.

La asocio stariĝis en la 15-a de junio 1985. Ĉiujare ĝi okazigas en Xinxiang-a Universitato prelegojn pri Esperanto. Ĉirkaŭ 4 mil personoj kontaktis esperantujon dank'al la klopodado de la asocio. La asocio ankaŭ okazigis internacian E-kunvenon kaj multfoje sendis reprezentantojn al la tutlanda E-kongreso. Multaj el ĝiaj membroj partoprenis en UK kaj Azia Kongreso de Esperanto kaj aliĝis al UEA.

Raportita de Liu Jiahe, Redaktoro: Xie Rui Feng el EPC



Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam completa manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis

dum nur tri jaroj ĝis 66 individuaj membroj kaj 18 esperantaj organizaĵoj, bibliotekoj kaj muzeoj, dise en la mondo. (ĝis februaro 2017).

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi") kaj krome la NUR PERRETA revuo ankaŭ estas tute SENPAGA! Kaj tio neniam ŝanĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-roj jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2016 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: *bert.boon@skynet.be!*

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon (Belgio/Eŭropo)

Iniciatoro de ENA,

Ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

(la fotoj el Esperanta Numismatiko)



Bert Boon



Mia vojaĝo al Usono (1)

■ Li Weilun (Ĉinio)



La 21-an de decembro de 2016 mi veturis al Bostono. Mia esperanta lernantino Shi Linjuan (Juano) akompanis min al la flughaveno. En la aviadilo apud mi sidis junulino el Kazahŝtano. Ŝi iris al Bostono por vidi sian patrinon. Ŝi parolas ruse kaj iomete france. Ni babilis ruse. Ŝi interesiĝas pri ĉinaj manĝaĵoj. Kiam ni atingis la flughavenon de Bostono, ni vidis, ke sur muroj estas skribita "Bonvenon" en multaj lingvoj, sed sen la rusa. Ni ridis nekomprene.

Mia bofilo venis al la flughaveno por bonvenigi min. Li veturigis min al sia domo. Miaj filino kaj genepoj tre ĝojis vidi min. Mia filino preparis bongustan vespermanĝon. Mi flugis 13 horojn, sed mi ne laciĝis. La tempa diferenco inter Pekino kaj Bostono estas 13 horoj, sed tio ne estas problemo por mi. Mi enliĝis kaj ellitiĝis normale laŭ la loka tempo.

Bostono estas la ĉefurbo de Massachusetts, kiu situas en la nordoriento de Usono. Bostono estas bela ĉemara urbo. La rivero Charles fluas de okcidento al oriento. Bostono estas historia urbo. La sendependa milito ekestis tie. Bostono estas kultura urbo. En ĝi troviĝas multaj famaj universitatoj. En 2001 mi unuafoje vizitis Bostonon. Dum 16 jaroj ĝi preskaŭ ne ŝanĝiĝis. La domo de mia filino estas malproksime de la urbocentro. Ŝi kaj ŝia edzo laboras en malsamaj kompanioj. Ili havas du gefilojn. La filo aĝas 14 jarojn kaj lernas en mezlernejo. La filino estas 11-jara kaj lernas en elementa lernejo. Ili ŝatas kanti, sketi, ludi tablotenison, lerni lingvojn kaj ludi muzikilojn. Ili vivas feliĉe.

De lundo ĝis vendredo mia filino kaj mia bofilo laboris en siaj kompanioj. Miaj genepoj lernis en siaj lernejoj. Mi sola restis hejme. Mi returnis kaj per reto mi instruis Esperanton kaj hispanan lingvon. Mi televidis kaj legis. Mi skribis artikolojn kaj verkis poemojn. Se la vetero estis bona,

mi promenis sur apudaj stratoj. Mi ludis pianon, kvankam mi ludis malbone. Mi purigis la domon kaj lavis manĝilojn. Tagmeze mi mem kuiris kaj post tagmanĝo mi siestis. Jen mia ĉiutaga vivo en Bostono.

La 23-an de decembro de 2016, la familio de mia filino kaj la familio de ŝiaj bonaj geamikoj kune komencis vojaĝi al la sudo de Usono. Ni flugis al Atlanta. Atlanta estis la ĉefurbo de la suda armeo dum la Suda-norda Milito. En Atlanta loĝas multaj negroj. Ĉie ni renkontis ilin. Ni tranoktis en malgranda hotelo. Kiam ni eniris la hotelon, jam estis la 12-a nokte. Laca kaj dormema, mi tuj endormiĝis.

La sekvantan tagon ni unue promenis en la Olimpika Parko. En 1986 la olimpikaj ludoj okazis tie. Poste ni vizitis la Akvarion de Georgio. Ni vidis multajn diversajn fiŝojn kaj aliajn maranimalojn. Ni spektis prezentadon de delfenoj. Fine ni vizitis la Ekspozicion pri Koka-Kolo. Tiu trinkaĵo naskiĝis en 1886. La vizitantoj povas senpage gustumi 100 specojn el diversaj landoj de kvin kontinentoj. Mi diris al ĉiĉeronino, ke Koka-Kolo estis tradukita en ĉinan lingvon kiel Kekou Kele. Kekou signifas "bongusta" kaj Kele signifas "ĝoja". Ŝi malfermegis la okulojn pro miro.

La 25-a de decembro estis Kristnasko. Ni flugis al Orlando. Ĝi estas grava urbo de Florida. Bela kaj varma, ĝi estas turisma urbo. Ĉie vidiĝas luksaj hoteloj. En Orlando loĝas multaj latinamerikanoj. Ni ofte aŭdis paroladon de hispana lingvo. Ni luis domon kaj du aŭtojn. Tiel ni mem povis prepari manĝon kaj libere veturi ien ajn. La unuan tagon ni vizitis la Maran Mondon. Tie estis ankaŭ prezentado de delfenoj. Oni povis manĝi en ĉiuj restoracioj per biletoj. La duan tagon ni vizitis la Universalan Studion de Orlando. Tie estis diversaj prezentadoj. Por spekti ilin ni devis viciĝi longtempe.

La 27-an de decembro de 2016 ni

forlasis Orlandon kaj veturis al la Spaca Centro de Kennedy. Ĝi estas tre vasta. Por ĉirkaŭrigardi ĝin la aŭtomobilo iris du horojn. La sekvantan tagon ni alvenis al Suda Karolino. Ni tranoktis en ĉemara vilaĝo. Ni promenis sur plaĝo, manĝigante mevojn. Ni biciklis laŭ la vojetoj inter pinoj. Ni pafis en iu pafejo. Ni multe amuziĝis kaj multe pagis.

La 31-an de decembro ni revenis al Atlanta. Ni vizitis la Radiostacion CNN. Ĝi estas fama en Usono. Oni raportas en 9 lingvoj, sed sen la ĉina. Vespere ni manĝis rostitan anason en ĉina restoracio. La 1-an de januaro de 2017 ni vizitis la Bestoĝardenon de Atlanta. Tie ni vidis ĉarmajn pandojn. Ili estas simbolo de amikeco inter Ĉinio kaj Usono. Tagmeze ni prenis aviadilon por reveni al Bostono. Nia 9-taga vojaĝo finiĝis sukcese.

La 28-a de januaro estis Printempa Festo. Ĉinaj loĝantoj de la komunumo renkontiĝis en la ĉinlingva lernejo por celebri la feston. Kvankam ili vivas en fremda lando, ili ne forgesas ĉinan kulturon. Ilia koro ĉiam kunligas la sorton de Ĉinio. Ili deziras al la patrio pli rapidan progreson kaj pli grandajn sukcesojn. En la vesperkunveno ili kantis, dancis, ludis muzikilojn. Mia nepo kaj lia kunlernantino prezentis humuran dialogon. La vesperkunveno estis plena je rido kaj aplaŭdo. (La 2-a parto aperos en la 3-a numero) Redaktoro: Ardo Hu Guopeng



Li Weilun kun siaj filino kaj nepino

Ekskurso al kamparo en aŭtuno

■ Wang Yun

La 1-an de oktobro 2016, mi iris kune kun miaj edzino kaj filinoj al mia bopatrino hejmo en malgranda montara vilaĝo por ĝui tie feriojn de la Nacia Festo.

Por diri la veron, mi el la profundo de mia koro ŝatas kamparon pro tio, ke mi naskiĝis en kamparo, kaj ke mi amas la fruktodonan nigran teron, kiu per siaj abundaj produktoj nutris min. Mi havas profundan senton por ĉiu arbo kaj ĉiu herbo en kamparo.

Tuj malantaŭ la domo de mia bopatrino sidas monteto, kovrita per pomarboj plene ŝarĝitaj de pomoj, tiel fajroruĝaj, ke ĉe la unua rigardo oni havas la senton, ke la monteto estas kvazaŭ kovrita de maro da flamoj salte leviĝantaj. Kia superba vidaĵo!

Parenteze, karaj amikoj, vi eble ne scias pri tio, ke Dalian-urbo iam estis nomata "la hejmo de pomoj", kies produktokvanto iam okupis kvaronon de la tuta Ĉinio. Ankaŭ Dalian estis iam fama pro siaj altkvalitaj pomoj. Antaŭ ĉirkaŭ 20 jaroj, se vi enirus en iun ajn vilaĝon en Dalian, vi certe havus la senton, ke vi estus en grandega senlima fruktoĝardeno, ĉar ĉie, kie vi estus, vi povus vidi, ke tie kaj ĉi tie kreskas granda nombro da pomarboj, tiel multmultaj, tute nekalkuleblaj. Se vi lokus vin en iu ajn fruktoĝardeno, vi certe havus la impreson, ke vi estus kvazaŭ ĉirkaŭita de orde starantaj densaj pomarboj, kaj ne kapablus orienti vin, vi certe perdus la



Pomarba ĝardeno en la kamparo

vojon kaj ne povus trovi la elirejon. Tiam la prezo de pomoj estis tre alta kaj la kamparanoj riĉiĝis de vendo de pomoj kaj vivis en bona stato. Sed nuntempe, granda nombro da pomarboj estis jam forhakitaj kaj elradikigitaj, kaj multaj fruktoĝardenoj bedaŭre malaperis el la vido. Karaj amikoj, eble vi faros al mi demandon: En kio kuŝas la kaŭzo? Laŭdire, ĉefe kaŭze de tio, ke superabundaj pomoj de Shandong-provinco invadis kaj okupis merkatojn. Pro tio, la prezo de pomoj de Dalian-urbo iam falis tre malalten je po 0.40-0.80 juanoj por kg. Ju pli da vendantoj, des pli malalta la prezo! Pomoj jam ne plu valoris tiam! Nun nur restas malmulte da fruktoĝardenoj ĉi-loke. Pro malmultiĝo de fruktoĝardenoj, la prezo ree plialtiĝis ĝis po 8.00-10.00 juanoj por kg. Ĉio rara, kara!

La dezirego puŝis min al la monteto kaj mi eniris en la fruktoĝardenon kaj navetis inter pomarboj.

La pomarboj estis plene ŝarĝitaj de grandaj ruĝaj pomoj. Eĉ la branĉoj fleksiĝis sub la ruĝovangaj fruktoj. En la aero ŝvebis agrablaodoro de pomoj, kiu tiklis la nazon. Mi vere ekstaziĝis antaŭ la pejzaĝo.

Entuziasmigita de ĝojo, mi elpoŝigis mian poŝtelefonon kaj per ĝi rapide faris kelkajn fotojn.

Mi plue min ŝovis profunden en fruktoĝardeno. Ne sciante kiom da tempo pasis, mi eliris el fruktoĝardeno kaj atingis montosupron.

Starante sur la montosupro, plena de ekstazo, mi ĉirkaŭprenis per rigardo la tutan ĉirkaŭe kuŝantan mondon.

Estis vere tre bela tago. Estis nek varme nek malvarme. La aero estis tre freŝa. La vate blankaj nuboj ŝvebis sur la lazura ĉielo. La brizo blovis foje kaj foje de la nordoriento kaj milde kisis la arbojn, herbojn, florojn ĉirkaŭ mi ...

Proksime prezentiĝis al la okulo herbejo punktita de sovaĝaj krizantemoj, ruĝaj, blankaj, purpuraj, bluaj kaj flavaj. Tie aro da neĝe blankaj ŝafoj kapmalleve paŝtiĝis, petoleme kapobatis unu kontraŭ alia, kantante blekis... Pli kaj pli flavaj fariĝis la folioj de la arbaro, unuj post la aliaj ili defalis tremante...

Ĉe la piedo de monteto dissemiĝis kaj duonkaŝiĝis inter arboj tegoltegmentitaj domoj, super iuj el kiuj leviĝis kolono da



Post naĝado en la kamparo

fumo, signo de preparado de tagmanĝo. De tempo al tempo, jen klare jen malklare ondis diversaj sonoj ...

Malproksime kuŝis sorgokampoj kun ruĝaj spikoj similaj al gaje brulantaj torĉoj. Kiam la vento blovis super ili, ili susuris kaj ondiĝis kiel maro ...

Pli malproksime etendiĝis ora tapiŝo de la rizkampoj, en kiuj rizspikoj rulis ondojn de oro. Oraj spikoj jen leviĝis jen malleviĝis ĉe ekpuŝo de la brizo. Mi kvazaŭ aŭdis la susurantan bruon de la spikaj ondoj ...

Ho! Kia aŭtuna pejzaĝo!



Lotusbusto en la kamparo

“Estas nur teorio, ĉu ne?”

■ **Wendel T. Pontes** (Brazilo)

La supra frazo kiu ofte ligiĝas al argumento koncerne kelkajn sciencajn teoriojn, estas ĉefe uzata por malgrandigi la gravecon de tiu teorio. Laŭ PIV, teorio signifas “supozo celanta klarigi ion, sed restanta en la sfero de la spekulativa penso”. Tiu difino estas prava, kaj vere koncernas tion kio estas teorio. Sed kiam ni parolas pri scienca teorio, estas notinda diferenco.

Scienca teorio estas kunligo de aro da sendependaj scioj, ligitaj inter si sisteme, logike kaj racie organizitaj. Tamen ne nur estas tio. La fundamenta diferenco estas ke scienca teorio baziĝas sur sciencaj pruvoj.

Scienca pruvo estas kiam oni starigas eksperimenton laŭ scienca metodo, por pravigi aŭ malpravigi pruvendan hipotezon. La kunigo de tiuj sendependaj pruvoj ekhavataj per scienca metodo estas la esenco de la scienca kono. Kiam estas teorio kiu orde kaj logike kunligas tiujn sciencajn pruvojn, ni diras ke la scienca teorio havas grandan kredeblecon.

La ĝenerala publiko ofte ne scias kiom

grava estas scienca pruvo. Kiel ekzemplo, kritikantoj de evoluismo argumentas, ke ĝi estas nur teorio, kaj ne estas pruvita. La amaso da sciencaj pruvoj kiu konfirmas ĝin, simple ne estas kontraŭargumentebla. Pli ol cent jaroj da senhalta esploro en diversaj sendependaj sciencaj fakoj fare de miliardo da sciencistoj ĉiam kaj ĉiam fortigas la teorion de evoluismo. Do, la ĝenerala konsento inter fakuloj estas, ke la scienca teorio pri evoluismo estas fakto.

Ĉu tio signifas, ke scienca teorio estas nekontestebla? Absolute ne. Kiam ekaperas novaj sciencaj pruvoj kiuj apogas aliajn teoriojn, la sciencistoj konsideras tiun novan kaj agas por krei novajn hipotezojn kaj pruvi laŭ scienca metodo. Tio okazas kun fiziko. Dum centoj da jaroj, la teorio kiu regis absolute pri gravito, estas tiu de Isaac Newton, kies esenco estas “materio kuntiras materion akorde kun la maso”. Sed Einstein alvenis kun nova propono, ke gravito ne estas forto, sed deformato de spacotempo. Kie la teorio de Newton ne plu validas, tiu de Einstein koheras kun la



Wendel T. Pontes

sciencaj pruvoj.

La beleco de scienca teorio estas, ke ĝi estas absolute ŝanĝebla. Ĝi evoluas akorde kun nia kapablo pli bone observi kaj percepti la mondon. Kaj feliĉe, la scienca metodo funkcias. Nun, kiam oni diras al vi ke scienca teorio estas nur teorio, klarigu al ili pri la diferencoj.

Wendel T. Pontes, Profesoro pri Zoologio en UFPE (Universidade Federal de Pernambuco), Brazilo. Membro de Brazila Esperanto-Ligo kaj fakdelegito de UEA pri Zoologio, Entomologio kaj Scienca Metodo. Vicprezidanto de ISAE.

La minacoj de fumado

■ **Robert Moerbeek** (Nederlando)

Raporto aperinta en *Puraj Pulmoj* (2016/1), la organo de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN) prezentis profumadajn minacojn al la homo.

Lastatempe oni malkovris profumadan kaŭzon pri pliaj malsanoj: kancero de hepato, makula degenero kun risiko blindiĝi, orofaciaj (buŝaj-vizaĝaj) fendoj ĉe ĵus-naskitoj, pli oftaj ektopia (ekster-utera) gravedeco, vira erekto-misfunkcio, reŭmata artrito, kojlo-rektuma kancero, tuberkulozo, diabeto kaj malfortiĝo de la imunsistemo.

Inter la kor- kaj angi-malsanoj kaŭzataj aŭ pliseriozigataj de fumado en la raporto kolektiĝas koratako, apopleksio, obsktrukco de la karotido (kolarterio), malvastiĝo de angioj en la kruroj (‘montrofenestraj kruroj’), diabeto, vaskula demenco, tre granda risiko je COPD (kronika obstrukca pulmomalsano), pli oftaj pneŭmonioj, pli grava (foje mortiga) astmo, malplia fekundeco de viroj (impotento) kaj virinoj: malpezaj naskitoj kun pliaj malsanrisko, pli ofta ekster-utera gravedeco, plia risiko

de blindiĝo (pro makula degenero), de reŭmatismo kaj aliaj aŭto-imun-malsanoj kaj longa listo plu.

Por 35-54-jara fumanta viro la risiko pri pulmokancero estas 11-oble pli granda ol ĉe nefumanto samaĝa. Ĉe 65-74-jaruloj eĉ 28-oble kaj ĉe samaĝulinoj 24-oble.

Fumado influas ankaŭ la kleronivelon: malalte kleriĝintaj homoj vivas meznombro 7 jarojn malpli longe. En 2014 20% el la plenaĝuloj kun infanoj foje fumis hejme, precipe kun pli aĝaj infanoj. Tamen ankaŭ el tiuj kun infanoj malpli-ol-4-jaraj 12% fumis hejme. Sed ankaŭ eksterdome 38% el la gepatroj kune kun infanoj vizitis fulplenan ejon.

Fina studo pruvis ke ankaŭ okazaj fumantoj konsiderinde pli riskas ol nefumantoj: precipe virinoj pli suferas cerban sangadon (hemoragion). En Eŭropo fruan morton kaŭzas malbona nutrado, tropezo, obezeco, hipertensio (alta sangopremo), manko de moviĝado kaj troa drinkado, sed ĉefe fumado. (Nederlanda



Robert Moerbeek

Revuo pri Medicino).

Ankaŭ e-cigaretoj povas ĝeni apudajn nefumantojn per plia sangopremo, irito de la gorĝo, nazo, oreloj, depende de la kartoĉenhavo. Kaj eĉ la nargileo (akvopipo) ne savas de i.a. stomaka, ezofaga, pulma kaj vezika kanceraj, malgraŭ la kredo ke la akvo filtras la tabakon.

Robert Moerbeek, sekretario de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN)



Gajo Li Chuanhua (Ĉinio)

Printempo venas

ho, mi jam vidas
printempon en verdiĝo
de salikbranĉoj!
ho, mi jam aŭdas
printempon en kantado
de ĉiaj birdoj!
ho, mi jam flaras
printempon en aromo
de fruaj floroj!
Ja tiel fluas
la versoj de printempo
el mia koro!



Jevgenija Sorokina (Rusio)

Vintra poemeto

Reĝo sidas sur la seĝo
Kaj rigardas li la neĝon.
Reĝo pensas pri reĝin'
Pro la tag' de Valentin'.
Kaj reĝino en kastel'
Pensas pri la verda stel',
Faras taskon, suspirante,
Pri la lingvo Esperanto.
Kaj la princo kaj princino
Ludas ŝakojn komputilajn
Kun diversaj geamikoj
El eŭropaj respublikoj.

Marda vespero

Decembra lasta jen vesper',
Plena je magi', esper'.
Kaj la neĝo, neĝo blanka
Falas, falas ĝis la planko.
Ni babilas konference
Kiel kutime, kun pacienco,
Pri poemoj kaj muziko,
Pri scienco lingvistiko.
Sidas mi en varma domo,
Manĝas grandan ruĝan pomon
Kaj verketas mi poemon
Kun inspir' kaj granda emo.

Anekdotoj pri Lusin

S-ro Lusin estis en urbo
Guangzhou (Kantono). Iutage li
eniris barbirejon por barbizado.
La barbiro vidis ke Lusin
surhavas malkaran veston. Li ne
tuj servis al Lusin sed al la aliaj.
Fine li senatente tondis por Lusin
la harojn kaj Lusin senatente

donis al li multe da mono sen
kalkulo.

Alifojte Lusin revenis en
la barbirejo. La barbiro tuj
atentege servis por li tamen
Lusin atentege kalkulis kaj
donis la ĝustan monon al li.
Lusin nur donis la devpagan
monon sed ne donis pli multe.
"Kial lastafoje vi donis al mi
tiom multe da mono sed ĉi-
foje nur la taŭgan?" demandis
la barbiro. "Vi senatente tondis
do mi senatente donis, kaj vi
atentege tondis do mi atentege
donis." - respondis Lusin.



Liang Naikeng (meze)

komencantoj:

Ĝuu la vivon

En malgranda vilaĝo de la nordorienta Ĉinujo, loĝas serena knabino Lina. Ŝi ŝatas ludi sur monteto proksima al sia hejmo. Sur la monteto kreskas diversaj herboj, floroj, kaj arboj, kaj vivas ankaŭ ĉiaspecaj insektoj. La monteto estas ne nur ilia reĝlando, sed ankaŭ la plej bona ludejo por infanoj. Kvankam la sterila monteto estas neniel interesa por la plenkreskuloj, tamen ĝi estas nomata "nesto" por la infanoj.

Por la plenkreskuloj, la arboj estas tro malaltaj kaj maldikaj por fari meblojn; la herboj ne estas sufiĉe densaj por paŝti; la tero ne estas fekunda por kulturi; eĉ nenio kio valorus moneron, estas trovebla el sub la tero. Sed por Lina kaj ŝiaj geamikoj, tie estas la plej kara nesto, feliĉa loko kiel paradizo.

Printempe ili ludas kun ĉiaj vivaĵoj, kun la arboj, floroj, herboj, abeloj, papilioj kaj akridoj, eĉ la birdoj kantas por ili. Post pluvo, ili serĉas helikojn, kiuj ŝatas kaŝi sin en la subflanko de folioj. Tiu, kiu trovas la plej multe da helikoj, estos la venkinto. Lina kutime ĝoje saltas pro la celtrovo. La ridego estas tia naiva kaj feliĉa, kvazaŭ ili trovas

grandan trezoron.

Dum somero, la plej ŝatata aktivo estas naĝi en la rivereto ĉe la piedo de la monteto. La infanoj ne scias kiom longa ĝi estas, sed ili bone scias ke nur parto el ĝi estas sufiĉe profunda por naĝi. Tie estas la senpaga naĝejo donacita de la naturo. Lasinte la ŝuojn je la riverrando, ili laŭplaĉe ĝuas en la akvo. De tempo al tempo ili faras kaŝludon: iu kaŝas ies ŝuojn, kaj la lastaj devas serĉadi. La venkito ofte koleras aŭ ploras, eĉ batas aliajn, sed neniam rompas la rilaton. Eĉ la larmoj estas dolĉa rememoro de la infaneco.

Kiam venas aŭtuno, la sovaĝaj fruktoj iom post iom maturiĝas. La plej ŝatata frukto estas morusoj. Ili logas la infanojn per sia brilruĝa koloro, abundsukeco kaj pura dolĉeco. La infanoj, inkluzive de Lina, venas ĉiutage por serĉi la maturiĝintajn. Ili atenteme serĉadas inter ĉiuj branĉoj ĝis ili tute certas, ke nenio maturiĝinta restas. En la okuloj de la infanoj, la morusarboj estas la plej grave valoraj. Ili tre zorgeme protektas la arbojn por ke ili donu pli multe da fruktoj en la venonta jaro. Ankaŭ ekzistas alispecaj fruktoj, nigraj, verdaj, malgrandaj kaj



Susi Xing Qishuang

dolĉaj ktp. La infanoj ne scias iliajn ĝustajn nomojn, sed scias kiuj el ili estas manĝeblaj.

Vintre dormas la insektaro. La monteto vestiĝas per blanka palto. Sed la infanoj restas viglaj. Ili pli gaje ludadas. Konstruante neĝan bastionon ili serioze preparas por la senpulfokuma batalo. Ili sketas sur la glaciĝinta rivereto. Ili kreas neĝflirtantan bildon per faligo de neĝo de sur arbo. Unuvorte ili ĉiam havas novajn ideojn por sinamuzi.

Kiel senzorgan kaj gajan infanecon Lina havas!

Ĉu vi kontentas pri la vivo? Se jes, domaĝu ĝin. Se ne, Ĝuu la vivon.

Susi Xing Qishuang, instruistino de Elementa Lernejo Baiyangshujie, Taiyuan, Ĉinio.

Tao Yuanming, ĉina granda pastorala poeto (352 aŭ 365-427)

La ĝardeno de persikaj floroj

Estis Wuling-ano, kiu vivis en la erao Taiyuan (376-396) de la dinastio Jin (265-420) kaj okupiĝis pri fiŝkaptado.

Foje, remante laŭ rivereto, li forgesis, kiom forpasis la irita vojo. Subite al li renkontiĝis persika arbaro. Sur ambaŭ bordoj de la rivereto, sfero de kelkcent paŝoj, neniu alispeca arbo miksis sin inter la persikujoj. La herboj vegetis freŝaj kaj belaj; la petaloj defalis delikate ŝvebantaj. Tiu fiŝisto tre miris pri la vidaĵo. Boati antaŭen li rekomencis, ĉar li intencis trairi la persikarbaron.

La arbaro finiĝis ĉe la fonto. Ĉi tie montriĝis monto, el kies kaverno ŝajne elfluis neklara lumeto. Li formetis la ŝipeton kaj eniris en la faŭkon de la monto. Komence la tunelo estis tiel mallarĝa, ke ĝi permesis trairon al nur unu homo, sed je ankoraŭ pli da kelkdek paŝoj ekaperis antaŭ li vasta spaco en plena helo: la tero ebena, la kabanjoj en bela ordo; jen kuŝas bonaj kampoj, plaĉaj lagetoj, kaj jen staras morusujoj, bambuoj kaj aliaj plantoj; la surkampaj vojetoj sin interkomunikas; la krio de kokoj kaj la bojo de hundoj aŭdiĝas tie kaj ĉi tie; la homoj, ĉu viroj, ĉu virinoj, sin movas por fari kultivadon, en vestaĵoj similaj al tiuj de eksteruloj; kaj la maljunuloj, infanoj, plezuras en sia ago.

Kun granda miro tieuloj vidis lin, kaj demandis, de kie li venis. Li detale respondis. Iu el ili do invitis lin al sia hejmo, kie oni regalis lin per vino kaj kokaĵo. Vilaĝanoj aŭdis pri tiu enmigrinto, kaj ĉiuj venis pridemandi. Ili mem rakontis, ke, por rifuĝi de la malordo de la dinastio Qin (221-206 a.K.), ilia prapatro gvidis siajn edzinon, gefilojn kaj proksimulojn veni en tiun ĉi lokon izolitan, kaj ke ili neniam eliris kaj tial apartiĝis sin de la mondo. Alvenis el ili la demando, kiu dinastio nun estas. Ili ne sciis pri la dinastio Han (202 a.K.-220 p.K.) – do ne paroli pri Wei (220-265) kaj Jin. La

gasto precize parolis pri kion li sciis, dum la aŭskultantoj vesopiris. Kaj ĉiuj aliaj, unu post alia, gastigis la migrulon en sia domo, ankaŭ kun vino kaj manĝaĵo. Post kelkaj tagoj de restado la fiŝisto adiaŭis la lokon, tiam ĉi-lokanoj diris al li: “Ne indu paroli pri ni al aliaj homoj ekstermontaj.”

Elirinte, li trovis sian boaton kaj revenis laŭ la antaŭa vojo, kun la faro: meti signon tie kaj tie. Kiam li atingis la urbon de la prefektujo Wuling, li vizitis la prefekton kaj raportis al li pri la okazintaĵo. La ŝtatoficisto

*El la ĉina tradukis Minosun**

tuj ordonis siajn subulojn sekvi la fiŝiston por reveni al la loko, tamen ili ne retrovis la signojn, kaj fine perdis la vojon.

Liu Ziji, nobla ermito en Nanyang, aŭdis pri tio, kaj kun ĝojo planis iri tien. Li ne sukcesis – ne longe poste li mortis de malsano. Kaj de tiam ne plu ekzistis pridemandanto.

**S-ro Minosun, alimome Xiong Linping, redaktoro de Ĉina Radio Internacia.*



S-ro Minosun

La sekreto

■ *Adil Olluri, Tradukis Bardhyl Selimi (Kosovo)*

Vedat Azemi, la hieraŭan vesperon, akre kverelis kun sia edzino, Selvete. Tiel akre, tiel malestime kaj arogante ambaŭ alparolis unu la alian, ke, kiu ajn aŭdinta ilin, pensus kaj kredus ke ilia kunvivado finiĝus ĉivespere.

La kvindekunu jara viro vivis kun kvardeknaŭjara virino, ekde antaŭ dudek ses jaroj. Ili interkonatiĝis en la koridoroj de la fako de la albana beletro, atendante la rezultatojn de la juniaj ekzamenoj, en ŝia dua lernoĵaro, dum lia kvara lernoĵaro. Sufiĉis unu demando pri ŝia nomo de nova profesoro kaj, ekde tiu momenteto, komenciĝis ilia senfina akompanado, kroniĝinta per geedziĝo kaj nasko de du filinoj, kiuj nun transpasis dudek jarojn kaj estis mirinde belaj, ĉiu pli ĉarma ol la alia. Neniu el ili havis plej etan deziron por sekvi la samajn studojn kiel iliaj gepatroj, kvankam ilia patro estis jam profesoro ĝuste tie, kie li estis iam mem studento.

En la unuaj 24 jaroj de la komuna vivo ili estis harmoniecaj, amplenaj kaj respektoplenaj, sen ia ĝenaĵo aŭ luktaĵo kiu efikus en ilia feliĉo. Ili havis la amon kaj la emocieton de la unuaj tagoj, eĉ en la aĝo, kiu, por multaj, apenaŭ konsideriĝus kiel amaĝo. Ili havis ankoraŭ junecan intimecon, malgraŭ tiom da jaroj pasigitaj kune, kaj multaj, pri tio povus diri ke, post tiu tempo ĉe geedzoj la sentoj nature cedas al la rezono, eĉ povus esti tiaj ke oni pensus ke, en tia aĝo, por la edzo kaj la edzino la sola emocia rilato estas la infanoj.

Sed, ĉe la profesoro Vedat kun Selvete la afero estis tute alia. Ŝajnis ke ili estis tentitaj ian fadenon inter si, kiu neniamfoje estis fleksita, aŭ ian puran vinglason, kiun neniamfoje ili lasis malplena, eĉ restis duonplena. Estis tio ia bona sorĉo, kiu neeksplikeble estis teninta ilin tiel, kvazaŭ ligitaj al forta kverka branĉo, kiun neniu venta ŝtormo povus faligi. Ne influis ankaŭ la fumo de la preparolaĉoj ĉirkaŭ la flirtoj de la profesoro, kaptinta la tutan urbon, kaj kontinue oni pridiskutis ĉirkaŭ ili, ŝajnis ke la homoj ne havis alian konservacian temon.

La famo de Vedat kiel piĉfikulo ege furoris kaj unu kozo tro ĉagrenis lin, ne ĉar lin malhelpis lia malmoraleco, mitiĝinta de malcululoj, kaj ne ĉar li strebis ke ili konsideru lin virtan homon, sed kiel verkisto, li deziris ke la homoj pli multe parolu pri liaj romanoj, kiujn ili povus tuŝi kaj tralegi kaj ne pri kozo, kiujn ili ne estis vidintaj kaj eble ne povus vidi iam ajn. Sed la malcululoj ne cedis kaj li ĉesis pensi pri ili.

Antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj, estis tiel multe disvastigitaj la onidiraĵoj pri flirto lia kun la blonda studentino, Suzana, de la kvara grado, kiel tiuj atingis la orelojn de lia edzino. Selvete apenaŭ

deziris aŭdi pri tio, ankaŭ tiam, kiam tion estis aldirinta al ŝi ankaŭ ŝiaj fratinoj, kiuj kontinue insistis ke ŝi devis klarigi tiajn kozojn kun sia edzo, sed ŝi apenaŭ malfermis la buŝon pro tio. Ĉar ŝi fidis al la edzo kaj, je nenia prezo, ne deziris rompi la komforton, lastlaste ne pro afero, kion oni atribuis kutime preskaŭ al ĉiuj profesoroj.

Tiel, ŝi, kiomfoje aŭdis tiaĵon, ŝajnis la surdulon kaj daŭrigis per siaj laboroj, samkiel dum la aliaj ordinaraj tagoj. Vedat estis por ŝi la aŭtenta idolo kaj heroo. Lia figuro estis grandioza en ŝiaj okuloj kaj koro, aparte post la problemoj kaj aborto de la tria gravediĝo, kio, post operacio, finiĝis malsukcese per abortigo de la sesmonata bebo, ekspektita alveni en ŝian vivon. Sed, la plej doloriga de ĉi tiu aborto estis la definitiva raporto de la kuracisto, kie oni skribis ke ŝi ne kapablis plunaski. Tio estis la plej terura novaĵo ricevita de ŝi dum la tuta vivo, kio profunde estis skuinta ŝin. Tia travivaĵo okazis en la oka jaro de la geedziĝo kaj estis ĝuste ŝia edzo kiu kuraĝigis ŝin kaj motivigis ŝin rekapabliĝi. Li havis neekzemplecan senton por ŝi, traktante ŝin kvazaŭ diinon, kvazaŭ estajon, kiu neniam devus ĉagreniĝi per vortoj, nek per malĝojoj, pro ne maturaj agoj.

Selvete, lia prudenta kaj nigraharara buklulino, estis kvazaŭ ikono, al kiu la kredanto, post peniga labortago, preĝis dumvespere.

Iun malvarman januaran nokton, antaŭ du jaroj, la profesoro sentis en si ne travivitan ĝenon, Estis tio, io kvazaŭ kulposento, peniginta lin dum multe da tempo, sed lastajn du semajnojn, li estis tro ĉagrenita pro tio. Li tenis sekreton dum dekkvin jaroj, kion li konfesis al neniu. Tiu sekreto, tiel intima kaj tiel dezirebla por li, tiel grava por lia vivo, kiu neniel devus malkaŝiĝi, estis la kozo kio, lastajn tagojn penigis lin preskaŭ ĉiutage, tamen ne konfesante al iu ajn. Lian spiriton estis kaptinta dilemo, plej granda en sia vivo, skuanta lin ĉiutage. Paroli aŭ ne paroli?!

Tio malkvietigis la profesoron, ĉe kiu komenciĝis blankiĝi la haroj. Li estis konvinkita ke nenio inter la Tero kaj la Ĉielo povas resti nemalkovrite. Sed li timis ke la eldiro ne rezultigis bone por li.

Simple, li sciis nenion por fari. Al kiu li rakontu, al kiu li parolu?! Al kiu li havu tiel multe da fido por elvolvi la enigmon, enfermitan de li longajn jarojn, kvazaŭ en rustiĝinta kesto, kiu bezonus apartan ŝlosilon por malfermiĝi. En ĉiuj ĉi demandoj por si mem, rezultigis precize ke lia edzino estis la plej proksima kaj plej fidinda homo, al kiu li povus sin esprimi kaj eligi tiun lanbulon, peniganta lin longajn semajnojn. Sed, lia ĝeno nun



Adil Olluri

estis kiamaniere aldiri ĝuste al Selvete tion, pro kiu li tenis tiun sekreton tiom da jaroj.

Vedat ne povis plu atendi kaj, tiun nokton, turniĝinta en teruran ansion, li parolis. Finfine li parolis. En la unua horo post la noktomezo, kiam kutime ili surmetis kovrilojn al la okuloj kaj al la pasigita tago, li, per la fingroj de la dekstra mano, estis malpeze tuŝinta ŝian hararon kaj ties bruston. Per mallaŭta voĉo, li estis antaŭdirinta ŝin ke li havis ion por sciigi, ion, pri kio li ne kuraĝis ŝin aldiri antaŭe. Ŝi estis vizaĝturnita al li kaj pretpretis okule kaj orele vidi kaj aŭskulti.

Ju pli multe li rakontis, des pli honteme ŝi alrigardis lin. Vi ne povas imagi kiom multe li tremis kaj voĉe malfortigis rakontante, ke li, kontinue, plutenis amrilatojn kun Igbale, lian unuan amatinon, konitan en lia naskiĝvilaĝo, kiu samtiel estis edzinigita ie en profunda rando de nia lando. Ili estis freneze enamiĝintaj unu la alian dum ilia frua junaĝo, sed la familioj malebligis ilian kuniĝon, ĉar iliaj prapatroj estis intermortigitaj, pro akvofonto troviĝanta meze de iliaj bienoj. Li transpasis facilmaniere la disiĝon de la unua virino kun kiu li eksentis sin masklon, sed ŝi estis tion grave travivinta. Ne ĉesis ŝi ami lin.

Post la edziniĝo, ŝi malrapide ekamis sian edzon, kvankam la menso apenaŭ disiĝis disde Vedat, kun kiu ŝi naskis ankaŭ filon, kiu post du semajnoj fariĝis dekkvin jara. La filo estas fariĝinta nun la tenilo kiu ligas ilin poreterne. La filo, kiun li vidis nur du fojoj tre mallonge, kaj kiu neniam rekonis lin kiel veran patron, fariĝas la ĉefa malkvieto de la profesoro.

Selvete, post la tuta ĉi rakonto fare de sia edzo, estis skuita tute, estis travivinta profundan ĉagrenon en la koro kaj ne povis paroli iun vorton en tiu malvarma nokto de januaro, kiu frostigis la tegmenton de ilia domo.



Rozo de la Espero (plantado) en la Esperanto-urbo



Arboplantado en la Esperanto-urbo

